

Revuo
ESPERANTO
Internacia

N-ro 596-7 (7-8) JUL.-AŬG. 1955



Reĝino kaj Princino de Esperanto

La esperantistoj de São Paulo feste kronis tiujn du ĉarmajn fraŭlinojn. Jen tronante sidas (maldekstre) F-ino Maria Leonilda Graneto, de Interfrata Esperanta Klubo, Reĝino de Esperanto, kaj F-ino Rosa Moriera Lô, de Esperanta Klubo "Zamenhof", Princino de Esperanto. Tio okazis en Januaro, kaj nur ĵus ni ricevis la foton, sed neniam estas malfrue por admiri la belon.

Fondinto : H. HODLER

Traduko kaj represo de artikoloj estas permesataj, kondiĉe ke oni citu la fonton. Oni sendu tian represaĵon al nia redakcio.

Redaktoro : HANS JAKOB
Palais Wilson, Genève, Svislando

Jara abono (1955) : 15 ŝil. anglaj (kun membreco kaj jarlibro 20 ŝil.)
Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en multaj landoj

Helpredaktoro : R. ROSSETTI
39 Willows Cres., Birmingham 12, Anglujo

Tarifo por reklamoj :
1 paĝo £6 ½ paĝo £3
¼ paĝo 30 ŝil. ⅙ paĝo 15 ŝil.

Ĉion pri administrado de UEA kaj de la revuo ESPERANTO, abonado, reklamoj, anoncetoj sendu al
UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO
Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

Anoncetoj pri korespondado :
2 pencoj por unu vorto aŭ 1 int. respond-kupono por ĉiu duo da vortoj
Legantoj en 80 landoj
Eldonnumero 6250



Enhavo

Post Montevideo.	Hans Jakob	..	..	..	..	..	..	paĝo 209
Pseŭdonimoj.	D-ro L. Tadolini	..	..	..	..	..	..	210
Ranlando.	Ch. Le Séac'h	..	..	..	..	..	..	216
Vizito ĉe la memoroj de Makarenko.	P. Balkányi	..	..	..	..	..	..	218
Vagado sub palmoj.	J. Ribillard	..	..	..	..	..	..	223
Du intervjuoj.	R. Bernard	..	..	..	..	..	..	224
Poezio								
Al iu.	N. Kurzens	..	..	..	..	..	..	212
T. Sekelj.	Marjorie Boulton	..	..	..	..	..	..	229
Mason Stuttard,	K.K.S. S. Urban	..	..	..	..	..	..	229
Desegnoj								
D. Wranka	..	..	..	..	..	..	..	229
J. Beltrán	..	..	..	..	..	..	..	231
Rubrikoj								
Kluba Vivo : Programoj.	J. Guillaume	..	..	..	..	..	..	211
Tra la Mondo Esperantista	..	..	..	..	..	..	..	213
Enigma Konkurso n-ro 100	..	..	..	..	..	..	..	221
Radio	..	..	..	..	..	..	..	230
Esperantista Vivo kaj Nekrologo	..	..	..	..	..	..	..	232
Novaj Libroj	..	..	..	..	..	..	..	233
40-a Universala Kongreso, oficiala komuniko n-ro 8	..	..	..	..	..	..	..	237
Internacia Konkurso	..	..	..	..	..	..	..	237
Oficiala Informilo	..	..	..	..	..	..	..	238

Revuo

ESPERANTO

Internacia

N-ro 596-7

Jul.-Aŭg. 1955



Post Montevideo

Senkonteste la sukceso atingita en Montevideo devigas nin revizii la ĝeneralan linion de nia tuta agado.

Trudiĝas aro da problemoj tre diversaj, kiuj postulas rapidan kaj decidan solvon. De organiza vidpunkto necesas ke en UEA grupiĝu ĉiuj fortoj ekzistantaj en la movado. Tio signifas ke ĉiuj Landaj Asocioj kiuj ankoraŭ ne aliĝis al UEA tion faru eĉ kun ofero. La fakaj societoj same devas serĉi pli intiman kontakton organizan kaj kunlaboran kun UEA. Unuvorte : **Ni devas krei unuecan fronton kies bazo estas la postulo : la enkonduko kaj ĝeneraligo de Esperanto.** Tio estas la platformo por ni ĉiuj, egale kian mondpercepton ni praktikas.

Unu el la urĝaj taskoj estas trovi kunlaborantojn en Azio kaj Afriko. Personoj kiuj korespondas kun samideanoj en tiuj kontinentoj kaj kiuj ne estas citataj en la jarlibro de UEA volu komuniki al ni adresojn.

Povas esti ke la politika malcerteco reginta dum la lastaj jaroj foriĝas kaj ke ni ree povos kalkuli je la kunlaboro de niaj samideanoj en sovjetaj landoj.

Pia deziro eble, sed ni rajtas esperi je tio, post la lastaj turniĝoj en la alta politiko tutmonda.

Gravaj plibonigoj estas antaŭvidataj en la servado de UEA. Pri tio sekvos informoj post la kongreso. Multaj ideoj kaj proponoj svarmas en la aero. Multon oni povus ankoraŭ fari, *se* ekzistus la rimedoj materiaj kaj personaj. La ofereco esperantista estas realaĵo ; ĝi havas ankaŭ sian limon. Ni ĉiuj konscias pri tio. Ja la mono ne estas ĉio kaj ekzistas alia maniero kunhelpi. La Centro de Esploro kaj Dokumentado arigis ĉirkaŭ si etan armeon da kunlaborantoj pri diversaj fakoj. Same la Serva Centro en Genevo grupigis aron da kunlaborantoj pri Biblioteka Servo kaj Enciklopedia laboro nun ekfunkcianta. Kiu volon havas por helpi venu al ni, ĉiu bonvolulo estas bonvenigata.

Al hezitantaj, distiko de Schiller montru la vojon :

Ĉiam alcelu tutaĵon kaj se vi mem ne povas esti tuto, tiam kiel helpanta membro tutaĵon aliĝu.

Hans Jakob

Pseŭdonimoj

LA uzo de kaŝnomo, tio estas pseŭdonimo, flanke de multaj verkistoj, havas tre antikvan devenon. La unua ekzemplo verŝajne venis de Aristofano kiu, apenaŭ dudekjara, verkis komedion subskribitan per nevera nomo (Bacchettanti).

La vorto *pseŭdonimo* devenas de la greka lingvo: *pseidés* (falsa), *ónoma* (nomo), kaj latinlingve estis difinita *nomen falsum gerens* (nomo enhavanta neveraĵon).

Oni povas rimarki, ke ekzistas granda diverso de pseŭdonimoj kaj de motivoj kiuj pravigas ilian uzadon. Per tio estas necese fiksi kelkajn distingilojn. La ŝanĝoj ĝenerale originas en ia vanteca sento. Ifoje oni volas kaŝi nomon trivialan aŭ malbelsonan aŭ nomon tro modestan aŭ eĉ tro konatan, kun la celo akiri nomon pli distingan aŭ laŭtsonan, pli originalan aŭ pli personan.

Estas vere, ke multaj verkistoj eliĝas el sia propra parenceco kaj patronomo *pour aller plus harmonieusement à la gloire* kiel diris la franca

verkisto Charles Nodier. Tio estas "por iri pli harmonie al la gloro".

Inter tiuj kiuj havis ĉi tiun malforton troviĝas eĉ famaj nomoj, kiel Voltaire (kiu nomiĝis Arouet), Beaumarchais (kiu estis Caron) kaj Metastasio, kiu per ĉilasta nomo anstataŭigis tiun pli ordinaran Trapassi. La dramverkisto Alexandre Robineau ŝanĝis sian nomon en Beaunoir ĉar oni kutimis moke voki lin *robinet* (krano). La verkisto Etienne Sénancour preferis tiamaniere nomi sin anstataŭ per sia vera nomo Pivert (verda pego).

Oni scias, ke ĉiuj altranguloj ekleziuloj ŝanĝas sian nomon, kiam oni elektas ilin Papoj. Tamen ne ĉiam estis tiel. La unua, kiu postulis kaj pretendis havi novan nomon, estis Papo Sergio II. Li mem taksis sian patronomon maldeca. Li efektive iom pravis ĉar ĝi estis Bocca di Porco (Buŝo de porko) !

Nun ni vidu kelkajn manierojn fabriki pseŭdonimojn. Unu el la preferataj rimedoj konsistas el

Persona informo de la redaktoro

Kiel sekvo de la ĉefartikolo en la Maja numero (Kunveno de la UEA-Estraro) mi ricevis aron da leteroj gratulantaj kaj aliaj insultantaj. Mi precizigas mallonge mian vidpunkton en la afero de la statutŝanĝo. Principe mi konservas mian opinion kiel antaŭe. Neniu devigis min ŝanĝi ĝin. Kio decidigis min ŝanĝi taktikon originas en jenaj pripensoj kaj argumentoj :

1. La Komitato de UEA decidis kun frakasa plimulto akcepti la proponatan statutŝanĝon. Ĝi portas la respondecon. Mi mem ne voĉdonis.
2. La opinibatalo prenis formon *personan*. Tiaj ide-interŝanĝoj venenas la

atmosferon, la efektiva temo nebuliĝas.

3. La daŭrigo sur tiu ĉi vojo kondukas al skismo en la pene atingita unueco. Bolonjo anstataŭ esti jubilea iĝus skandala kongreso.

Por tion eviti mi cedis, tute defendante mian vidpunkton. Dum la kongreso en Bolonjo mi havos okazon elmontri diversajn aspektojn de la tuta malinterkonsento deĉest Zagreb kaj Haarlem.

Mi profitas la okazon por informi korespondantojn ke mi nun reprenos la agadon post kvinmonata malsano nerva, kio klarigas mian silenton je korespondaĵoj.

Hans Jakob, Redaktoro.

30 Majo 1955.

anagramo de la literoj de la ĝusta nomo. Tio estas inversigo, interŝanĝo de la ordo de la literoj tiel, ke oni povas aranĝi alian nomon, diversan sed samliteran. Mi jam citis Robineau/Beaunoir. Renato Fucini fariĝis *Tanfucio Neri*, kaj Carlo Alberto Salustri estis *Trilussa*.

Multfoje oni alprenis la nomon de la naskiĝloko. Tiel Michel Eyquem, kiu naskiĝis en la kastelo Montaigne, fariĝis en la franca literaturo *Montaigne*. Guittoncino dei Sinibaldi, la amiko de Dante, estas konata nur kiel *Cino da Pistoia*, kaj Carlo Lorenzini la fama aŭtoro de Pinokjo estas *Collodi*.

Estas rimarkinda la fakto, ke virinoj prenis virajn nomojn kaj inverse. Ni memoras ekzemple la verkistinon Lucille Aurore Dupin, kiu sin virigis per *George Sand*. Charlotte Brontë uzis komence *Currer Bell* kaj la eldonisto konsterniĝis unuafoje renkontante la timeman virinon. Male, la bretona poeto Paul Deforges Maillard presigis poeziaĵojn kun la virina pseŭdonimo *Fraŭlino Malcrais de la Vigne* kaj akiris multajn laŭdojn kaj eĉ varmajn deklarojn de amo, sed kompreneble kiam li malkaŝis sian identecon perdis ĉiujn admirantojn.

D-ro L. Tadolini

Kluba vivo : Programoj

La bazo de la grupo estas ĝia aŭ ĝiaj animantoj. Se iu grupo havas bonan prezidanton aŭ sekretarion, ĝia sukceso estas certa.

Kian specon de programo oni devas prepari? Evidente tio dependas de la atmosfero: ĉu por instruitaj personoj kiuj havas internaciajn rilatojn, ĉu por la popola klaso, ĉu por silentemaj Norduloj, ĉu por babilemaj Suduloj.

Ĉiukaze ni devas plaĉi al niaj klubanoj kaj pro tio ni devas interesigi kaj amuzi ilin.

Prelego (parolado, paroladeto) pri interesa temo. en nova malgranda klubo ne nur la sperta gvidanto faru prelegojn. Estas ekzerco skriba kaj buŝa por novuloj fari prelegon. Oni povas tiam korekti la manuskripton, antaŭ ol la novulo prezentas sian prelegon, sed oni ne kritiku lingvajn erarojn post la prezentado. Tre popularaj estas vojaĝpriskriboj, precipe kun lumbildoj. Utiligu la lumbildaparaton. Oni povas eĉ elekti temon por la prelegoj laŭ ekzistanta lumbildmaterialo.

Diskuto. Oni povas diskuti—kompreneble en Esperanto—libron aŭ filmon aŭ kion ajn. Aŭ oni diskutu—ankaŭ en Esperanto—okazintan aŭ okazontan ekskurson, feston, aranĝon. Ĉiam iu kapablulo gvidu la diskuton. Sed oni povas aranĝi diskutojn ankaŭ tiel, ke la novuloj gvidas, kaj poste



“La plej grava evento post la *Infer-traduko de Kalocsay*”—*W. Auld*

IBSEN: PEER GYNT

El la norvega tradukis E. A. Haugen

Prezo : bind. 15 ŝil., broŝ. 12ŝ. 6p., afranko 9p.

Eldonis : ELDONA RONDO,
Boks 178, Trondheim, Norvegujo

Mendu ĉe via librovendisto aŭ ĉe

U.E.A., Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

estas kritikataj de la aliaj en la klubo—tio kompreneble plej konvenas en malgranda klubo. Tiel oni povas eluzi ankaŭ diskuton por *studi* dum klubkunveno.

Skeĉo (teatraĵeto) estas taŭga por variu kaj gajigi la programon. La sveda movado havas gravan sperton. Novuloj ne ludu tro longajn skeĉojn, kiuj postulas multan atenton de la rigardantoj. Oni povas tre simple skeĉigi iun spritaĵon el iu gazeto—sed ĝi devas esti amuza! Kostumoj ne necesas, sed povas esti tre efikaj: ĉapo povas montri oficiron, poŝtiston, ktp., blanka jako kuraciston, ktp.

Instruado. Se la klubo ne kunvenas nur por lerni, studi, oni zorgu, ke la programo ne enhavu tro da lernejosimila instruado. Kompreneble ĝi ne manku, sed oni eĉ ne bezonas ĝin en ĉiu kunveno. Por eviti la inertan sidadon dum tiaj instruaj programoj, oni povas enkonduki ian serian programeron por instruado, ekz. kun amuza konkurso pri vortoj aŭ esprimoj instruitaj en la antaŭa kunveno.

Literaturo. Parolu pri la aŭtoroj kaj pri iliaj verkaĵoj, legu iomete el la verkaroj. Memoru ankaŭ la antologiojn, kaj la propran nacian literaturon. Esperantigu (tasko por iu klubano aŭ grupoda klubanoj) nacilingvan novelon, poemon, romanon ĉapitron, kiu estu poste legata en kunveno. La klubo abonu eksterlandan gazeton. Instigu al prunteprenado de libroj. Fondu kluban bibliotekon.

Kanto kaj muziko. Eluzu tiujn kiuj povas ludi iun instrumenton. Formu muzikan studrondon, se eble. Kantu kaj muziku multe.

La sveda movado estas plej ambicia: en Malmø, S-ro Jan Strønne havas treege seriozan organizon. Krom studrondoj altkvalitaj, kiuj laboras 7-8-oje en la hejmoj, la klubo kunvenas 1-2 foje ĉiumonate, prefere en ĉiam diversaj ejoj. Ili luas minimume 7-8 monatojn antaŭe. Sekve oni preparas ĉion minimume *unu jaron* antaŭe. En la klubkunvenoj okazas: prelegoj kun lumbildoj, filmoj pri geografia temo aŭ festoj kun teatraĵoj (2-3), artaj vesperoj kun muziko, laŭtlegado, Viva Gazeto kun multaj partoprenantoj.

En Borås, Akademiano Ferenc Szilágyi ĉefe volas plialtigi la nivelon de la kulturo. Ekzemple li organizis legrondojn de proksimume 6 personoj, kiuj legas unu post la alia la saman libron. Kiam la programo finiĝis, ili ellotumas la librojn inter la

Al iu

*Vi, bela paĝ' en Libro de l' Destino,
vin for jam meti ne deziras mi :
post longe longa vane vaga vojo
sub sun' senluma, en senĝoja ĝojo
rigard' ravite nun admiras vin.*

*Ne timu jam : ne tedos nin enuo,
nek nin atingos sanga tragedi' :
nur por moment' min lulu via sino,
vi, bela paĝ' en Libro de l' Destino,
kaj—mi trankvile foliumos plu.*

N. Kurzens


partoprenintoj. Li dezirus konkursojn de fotografado, eseoj kaj romanoj inter la grupoj.

Mi havis la okazon vidi rimarkindajn programojn de la grupoj de Londono, Parizo, Torino kaj Zagreb kaj ni kredas ke estas bedaŭrinde ke kelkaj el la paroladoj restu en la klubo. Pro tio, ni tre ŝatus ke la plej agemaj kluboj interŝanĝu regule pretajn prelegojn kiuj havas internacian intereson. Jam 2 Francoj, S-roj J. Asqueri kaj Dessoit faris tiajn interŝanĝojn kun F-ino Brandt de Konstanz kaj S-ino K. Zacho de Kopenhago. Ni ankaŭ provis similajn aranĝojn inter la urboj Londono, Parizo, Romans kaj Zagreb. Ni kredas ke tiaj paroladoj povas helpi al internacia interkompreno.

Ni fine povas aldoni kelkajn aranĝojn: vizitoj al muzeoj, fabrikoj, ktp., interŝanĝoj de vizitoj inter diversaj landoj por kompari familian vivon, komunaj manĝoj okaze de Kristnaska aŭ datrevenaj festoj, promenadoj, ekskursoj—piede, bicikle, aŭtomobile—kun piknikoj, ktp. La klubo de Romans organizas ĉiujare 2 aŭ 3-tagan vojaĝon en aŭtobuso kiu krom la intereso kaj amuzado alportas profiton.

J.G.

Ni memorigas al vi libreton kiu povas helpi al la kluba vivo : Per kio ni amuzu nin ? de Rosenberg-Malmgren.



Tra la Mondo Esperantista

Ni petas regulajn raportojn aŭ raportetojn el ĉiuj mondpartoj por tiu ĉi rubriko, por ke ĝi prezentu tutampleksan bildon pri agado, eventoj kaj interesaĵoj el la Esperanta mondo.

Migranta apostolo.—La estona Esperanta prelegisto Eino Loooris, post sesjara loĝo en **Aŭstralio**, entreprenis vojaĝon tra Nov-zelando, Fiĝio, Havajo ĝis Brita Kolumbio, Kanado. En ĉiu loko li donis intervjuon pri Esperanto al la landaj gazetoj: entute ĉ. 30. En Honolulu li ankaŭ prelegis en Esperanta kaj angla lingvoj en la Havaja radio. Surŝipe li poste kun oficiala permeso paroladis pri Esperanto al la pasaĝeroj de *Orion* tiel interesige, ke grupo de pasaĝeroj komencis lerni la lingvon sub lia gvido. En Vancouver kaj Victoria la gazetoj plue raportis pri li, altirante atenton de disaj lokaj samideanoj, kiuj rezulte formiĝis en grupon.—Admirinda agado!

Kuraĝe eksteren.—Komitato por laŭcela Esperanto-propagando* ĉe **Aŭstria** Esperantista Federacio, Wien XV, Fünfhausgasse 16, komencis penetrigi Esperanton inter la membroj de Internacia Asocio por Sociala Sekureco. Tiu aktiveco estas aprobita de UEA. Sekve la Delegitoj, petitaj de la nomita komitato, taksu la aferon ne malgrava, ĉar temas pri serioza kaj sistema agado. Sin anoncintoj ricevos detalajn informojn.

* Vidu p. 178 de la Junia numero.

Urĝe. — La 3a Esperantista Eŭkaristia Mondkunveno okazos en la kadro de la 36a Internacia Eŭkaristia Kongreso de 17a ĝis 24a Julio en Rio-de-Janeiro, **Brazilo**. Oni sendu flugpoŝtajn kaj telegrafajn salutojn al: Esperantista Sekcio, Internacia Eŭkaristia Kongreso, Palacio São Joaquim, Rio-de-Janeiro.

Juna flamo.—La esperantista rondeto "Esperanto-Junularo" ĉe la Kleriga Domo en Třebíč, **Ĉeĥoslovakujo**, organizis du Esperanto-kursojn por gelernantoj de 10-15 jaroj. La kursojn gvidas S-ano Th. Killian. La porknaban kurson partoprenas 18 lernantoj, la alian 11 knabinoj. Ĉiuj knaboj kaj 7 knabinoj daŭrigos sian studadon en la Somera Esperanto-tendaro okazonta en Julio apud la val-diga lago ĉe Vranov.

Kaj la Bulonja urbestro iros Bolonjon!—Al la kongreso de UEF, 28-30 Majo, en Arras kaj Boulogne, **Francujo**, aliĝis ĉ. 100 personoj. Ĉeestis ankaŭ: S-ro Marie kiel reprezentanto de la Ministerio de Edukado, S-ro Guy Mollet, urbestro de Arras kaj Prezidanto de Eŭropa Konsulta Asembleo, S-roj Lefranc, deputito kaj Durieux, senatano, la Prezidanto kaj Sekretario de la Komerca Ĉambro, k.a. Speciale menciinda estas la interveno de S-ro Mollet en la kunsido de la 29a de Majo. Tiu kunsido okupiĝis pri la lingva problemo en Eŭropo kaj en la diskuto partoprenis S-ro Petit kaj Prof-oj Laurat kaj Lapenna. Poste S-ro Petit en franca lingvo prezentis proponon de UEF, ke la Eŭropa Konsilantaro instigu kelkajn el siaj membro-ŝtatoj enkonduki Esperanton en almenaŭ po unu lernejo kaj instrui Esperanton al infanoj 10-12 jarojn aĝaj dum unu jaro; la plej bonaj lernantoj kunvenis en Strasbourg sub la aŭspicio de la E.K., kiu tiamaniere havus la okazon mem tiri la konkludojn. La

dua propono, prezentita de S-ro Petit, estis, ke la Eŭropa Konsilantaro donu la necesajn ejojn en la Eŭropo-Domo en Strasbourg por okazigo de la Ekspozicio, kiu tiucele estus transportita el Montevideo. Post la tre lerta parolado de S-ro Petit, parolis S-ro Guy Mollet, kiu promesis subteni ambaŭ proponojn. Konsiderante la fakton, ke Guy Mollet estas profesoro de la angla lingvo kaj ke li ĝis antaŭnelonge subtenis la t.n. anglan-francan dulingvismon, lia interveno kaj promeso estas des pli signifaj. La gazeto *Aurore*, unu el la grandaj parizaj ĵurnaloj, sendis al la kongreso specialan korespondanton el Parizo. En la morgaŭa numero de

la gazeto aperis granda dukolona artikolo, en kiu estis precipe akcentita la starpunkto de Guy Mollet.

London la 30an estis en Boulogne-sur-Mer solenaĵo sur la Placo de D-ro Zamenhof antaŭ la stacidomo. Poste estis solena akcepto en la urbdomo, kie oni regalis la ĉeestantojn per ĉampano. Tie en parolo la urbestro promesis ĉeesti la Kongreson en Bologna laŭ la invito de la tiea urbestro.

De nordo al sudo.—S-ino Anna Alamo-Sandgren, vojaĝanta sekretario de la sveda sekcio de KELI, revenis al Svedujo post rondvojaĝo sur Balkano, precipe en **Jugoslavio**.



Digna kaj pompa manifestacio.—La 3a Beneluksa Esperanto-Kongreso en Utrecht, Belgujo, estis laŭ raporto de S-ro Rapley, "unuaranga travivaĵo. La kantato estis por mi la plej elstara ero de la kongreso. Molenaar komponis por tio melodiojn de tre alta nivelo, jen solenaj, jen viglaj, kaj la ĥoroj belharmonie prezentis ĝin sub gvido de fama nederlanda direktisto." La teksto de la kantato estis de Zamenhof kaj D-ro Privat. La kongreso, 28–30 Majo, okazis sub la protekto de lia Ministra Moŝto D-ro W. Drees, kaj Prezidanto de la Honora Komitato estis lia Nobela Moŝto Jonkheer C. J. A. de Rantz, urbestro de Utrecht. Nura travigardo de la 36-paĝa ilustrita kongreslibro faras imponan impreson. Listiĝas 241 kongresanoj, kaj oni prezentis la ĉefverkan tragedion *Gysbrecht van Aemstael* de J. v.d. Vondel, pri kies traduko (de Inĝ. J. R. G. Isbrucker) L. Totsche siatempe skribis: "Ĝi estas neordinare kuraĝa ago, ĉar la tasko estis ekstreme malfacila." Saluton kaj gratulegon!

Ŝi faris proks. 40 prelegojn pri Svedujo en universitatoj kaj en kristanaj rondoj de diversaj konfesioj antaŭ 7,700 aŭskultantoj. S-ino Sandgren ĉie uzis Esperanton kaj estis ĉie kore akceptata. La kunvenoj estis bone vizitataj, kaj foje duono de la alvenintoj ne trovis lokon en la kunvenejo.

Oni aĉetas infan-desegnojn.—Ekspozicio de infandesegnoj en Skövde, **Svedujo**, forte imponis la estraron de la urbaj popollernejoj, kiu aĉetis plurajn el la bildoj kaj deziris multajn pli, kiuj tamen estis jam venditaj! Oni do petis la Esperantan klubon

havigi infan-desegnaĵojn kaj pentraĵojn por ornamati la urbajn lernejojn. La klubo sin turnas siavice al ĉiulandaj esperantistoj kun peto sendi aŭ elpeti ĉe geinstruistoj tiajn bildojn. Adreso: Klubo Esperantista, c/o Lars Westman, Gransikag. 1c, Skövde, Svedujo.


Belulinoj en belajtoj.—La 27an de Majo vestaĵoj faritaj el indoneziaj batikoj estis prezentataj en Hôtel des Bergues, Genevo, **Svislando**. La vestaĵojn portis graciaj virinoj; S-ino Toemenggoeng donis Esperantan komenton, kiu estis tradukata francen.

Batiko=maniero ornamati ŝtofon pentrante per vakso kaj trempante en tinkturon.



Fervoja fervoro.—Ĉe la 7a kongreso de I.F.E.F. en Zurich, Svislando, 8a-13a de Majo, kuniĝis 263 anoj el 14 landoj. Dum la inaŭguro parolis S-ro Thomann, urba konsilisto, kaj D-ro Hertli nome de la Ĝenerala Direkcio de la Svisa Federacia Fervojo. Post nur dutaga studado D-ro Hertli prezentis sian alparolon en senriproĉe bona Esperanto. D-ro Privat en sia festparolado akcentis la emon de fervojistoj servi al la homaro kaj serĉi ligan al eksterlando. La diskutprogramo, havis altan valoron kaj seriozecon. Parolis po unu reprezentanto el 10 landoj. La paroladojn oni tradukis en naciajn lingvojn kaj transdonis al fervojdirekcioj kaj sindikatoj. Dum la laborkunsidoj oni okazigis ekskursojn nur por la virinoj: tio havis grandan sukceson. Ĉefa ero en la komuna ekskursprogramo estis vojaĝo tra la tuta lando per moderna rapidvagonaro senpage disponigita de la Svisa Federacia Fervojo. La organizaĵo havas nun 1700 membrojn en 22 landoj. Okazis postkongreso en Homburg, Sarlando, kun 150 partoprenantoj. Ni kore gratulas la fervojistojn pro celkonscia kaj prospera laboro.

Ranlando



Foje ĉe l' foiro de Keraez en Bretonujo, Ervan Allo, vilaĝano el Gronver, fromaĝon aĉetis por manĝi dumvoje hejmen.

Venas la momento por la krustrompo.

Ho ve! en la ujo nia viro ektrovas ne fromaĝon sed vivan ranon kiun la ŝercema kunulo tien enŝovis.

La besto ekkrietas . . .

“Ci blekas rane, sed blekas vane”, diras la kamparano. “Pagita ci estas, manĝita ci estos”.

Jen dirate, tuj manĝate senkomplete . . .

Ĉu do, laŭ tio, en tiu lando ranojn oni manĝas? Eble jes, sed certe tre malofte, pli malofte kredeble ol en multaj aliaj landoj.

Kial kredi ke manĝi ranaĵon estas naŭze? Baldaŭ vi ekscios ke tio estas, ne nur manĝebla, sed bonega. Ni ne scias ĉu sur Olimpo la gedioj tion ŝatis, sed estas certe ke ĝi estus inda esti prezentata sur la tablon de la plej postulema gastronomo.

Se vi volas koni unu el la regionoj kie eble oni plejmulte manĝas ranojn, ne pridiskuteble, ĝi estas Nantes kaj ĝiaj ĉirkaŭaj urbetoj Basse Goulaine, Palet, k.t.p.

Tie, precipe dimanĉe, vi povas vidi, laŭlonge de l' riverego Loire, kaj aliloke, longajn vicojn de veturiloj kaj 'cikloj proksime de konataj restoracioj.

Ni eniru . . . Tuj ĉe la sojlo, niaj flariloj estas allogataj de l' aromaj parfumoj, bonodoraj efluvojn fluas el la kuirejo, plenigantaj la tutan domon kaj eĉ la straton. Hm! tie oni bakas ranaĵojn! La akvo privenas en vian buŝon.

Sed se vere “estas faskoj kaj faskoj” ankaŭ estas ranaĵo kaj ranaĵo, same kiel saŭcoj kaj saŭcoj! Ĉiu restoracio, ĉiu kuiristo aŭ kuiristino, havas por prepari tiujn batracojn siajn kutimojn, siajn receptojn. La rankarno certe estas io, sed la ingrediencoj kaj la bakado ankaŭ plimulte!

Baldaŭ ankaŭ vi scios ke, por vere valorigi, bonigi kaj ŝati tiujn pladaĵojn, estas dezirinde, necese, trinki samtempe iun el tiuj regionaj vinoj, la blankaj “Muskadeto” kaj “Dika Planto” kaj verŝi sur la tuton tiun ruĝan violodoran “bakon”.

Baldaŭ la tono, la diapazono, rapide altiĝas, la konversacioj laŭtiĝas, oreloj, vangoj, eble nazoj, iomete ruĝiĝas . . . Oni estas feliĉa!

Kie do, vi demandos, trovi tiom da ranoj ?

Ilia devenejo kuŝas ne malproksime, tri mejlojn eble. Ĉefe ĝi estas la "Lago de Grand-Loko" (Fr. Grand-Lieu) kaj ĝiaj ĉirkaŭaĵoj. Stranga estas tiu akvospatco, la plej vasta kredeble en Francujo, kun siaj sesdek kvadrataj kilometroj. Sed ĝi povas esti pli aŭ malpli ampleksa. Ĉio dependas de l' vetero, de l' abundeco de l' tributo kiun alverŝas en ĝin la du riveroj Ognon kaj Bulonjo kaj de la kvanto kiun elfluigas la tria, Aĉeno (Fr. Acheneau) kiu forportas la akvon almare.

Ĝi ne estas pli profunda ol 2m. aŭ 2m.50.

Birdoj traflugas l' aeron, lokiĝas aŭ naĝas sur la lago aŭ subakviĝas, grizaj aŭ blankaj mevoj, bluverdaj alcionoj, longbekaj, longkolaj, longkruraj ardeoj . . . Ĉio zumadas, krietas, pepas.

Enakve la vivo ne estas malpli multforma : nigraj hirundoj, larvoj, malrapide naĝrampas dum naĝas ĉiuspecaj fiŝoj, ezokoj, karpoj, tinkoj, bramoj, plotoj, angiloj . . . kaj, de malmulte da tempo, katfiŝoj, kiuj detruas multege da fiŝidoj. La vivo detruas, sed nutras la vivon . . . Tio, ho ve ! estas ankaŭ la vivo !

Kompreneble, la fiŝkaptado ĉi tie estas kiel eble plej agema, kaj estas la vivrimedo de multaj familioj. La fiŝkaptistoj kuniĝas en kooperan societon kiu ŝuldas lupagon al la posedanto de la tuta lago kaj ĉirkaŭaĵoj : Markizo de Juigné.

Tamen multaj el ili nuntempe komencas forlasi tiun profesion por dediĉi sin al la ranoj, kiuj, laŭ onidiro, estas multe pli gajnigaj . . . Jes, al la rankaptado !

Tiu kaptado estas kiel eble plej simpla . . . La logilo povas konsisti nur el iom da ruĝa ŝtofo ĉe l' ekstremaĵo de ŝnureto. La rano alnaĝas kaj . . . mordas. La kaptisto ektiras tre rapide kaj ĵetas la besteton aeren. Per la maldekstra mano ĝin li kaptas lerte kaj ĵetas en sakon . . .

.Nenio pli simpla, kiel vi vidas !

Ĉiuj ranoj, vivaj, aŭ la senhaŭtigataj femuroj kiujn nur oni manĝas, estas ekspeditaj al Nantes kaj ĝiaj ĉirkaŭaĵoj, kaj ankaŭ aliloken, eĉ ofte tre malproksimen, fremdlanden, eĉ al Anglujo. Jes, al via lando, ho vi, anglaj amikoj, kiuj mokridas pri la Francoj, kiujn vi nomas "Froggies". Do, ĉe vi ankaŭ estas ranŝatantoj . . .

Printempe, ĉe l' komenco de l' nokto, kiam la nigra noktovualo sterniĝas sur la tutan kamparon, kiam ja ĉio ekdormiĝas, krom eble malproksime kelkaj hundbojoj aŭ malĝojaj krioj de noktobirdoj . . . tiam unue kelkaj raŭkaj *gŭak gŭak* . . . aliaj samaj krioj respondas . . . Baldaŭ dekoje, milope, milionope aliaj voĉoj respondas. La koncerto ankaŭ etendiĝas sur la tutan pejzaĝon. El ĉiu akvofluejeto, el ĉiu rivero, el ĉiu ŝlimakvejo, el ĉiu herbejo el fosejoj, el kanaletoj, el la marĉoj, kanejoj, kaj precipe el la vasta lago, la unutona raŭka koncerto daŭros ĝis la sunleviĝo.

Jen estas la poezio de l' akvoj, de l' marĉoj. Ĝi fariĝas pli kortuŝa kiam oni ekscias ke tiu ranblekado ankaŭ estas amkanto . . . amvoko.

Jen kial eble ankaŭ Aristofano, laŭ sia maniero, iam ĝin kantis . . . Prava li estis . . . Ĉu ne ?

Ch. Le Séac'h

★ *Ni devis, kun bedaŭro, mallongigi la supran ĉarman artikolon.*

P. Balkányi :

Vizito ĉe la memoroj de Makarenko

MULTAJ esperantistoj jam legis pli frue pri la fama rusa pedagogo, instruisto kaj edukisto, sed ne en lasta vico verkisto Anton Semjonoviĉ Makarenko, en *Literatura Mondo*. Li fariĝis konata pro siaj homamaj kaj pedagogaj edukmetodoj, kiujn li uzis por bridi sovaĝajn, vagemajn, needukitajn kaj ŝajne needukeblajn junulojn, por kiuj li direktis kaj gvidis specialajn junulkoloniojn. En tiuj la junulo per la gvidado, per la konduto de la edukistoj, per la propraj spertoj kaj per partopreno en la kolektiva vivo, en la komunaj laboro kaj lernado akiris homecon, memfidon, studkapablon kaj ĉefe tion, ke li ne estas perdita kaj persekutata estaĵo, sed sukcespromesa homo, plenrajta civitano, valora parto de la popolo, kies vivo havas sencon kaj promeson, por fariĝi per ofte streĉaj klopodoj, per persistaj studoj kaj laboroj inda membro de la homa socio.

Makarenko jam mortis, sed lia instruo vivas plu kaj interesas vaste tra la mondo la pedagogojn, la progresemaĵojn homojn. Tial certe estas interese fari mallongan viziton ĉe liaj memoraĵoj, hejmo, edzino, laborkolegoj. En tio helpas al ni nun hungara pedagogo István Szokolszky, direktoro de la Centra Pedagogia

Plueduka Instituto en Budapeŝto. Laŭ lia deklaro dum sia studvojaĝo en Sovjetunio, lia plej granda travivaĵo estis la vizito al la loĝejo de Makarenko. Tiu estas sur la oka etaĝo de la Domo de la Verkistoj en Moskvo, kie la fama pedagogo vivis depost sia translokiĝo en la sovjetan ĉefurbon ĝis sia morto. Lia vidvino, Galina Stahijevna Makarenko, amike akceptis la vizitantojn—ĉar kune iris

Gmurman, kunlaboranto de la *Makarenka Laboratorio de la Akademioj de Pedagogiaj Sciencoj* kaj la interpretistino. La edzino de Makarenko, mem pedagogo, simple vestite, per senpera, amika konduto kreis tuj simpatian atmosferon en la triĉambra loĝejo. En granda, malhel-nuksbruna libroŝranko sub vitro estas videblaj la kolektitaj kaj ordigitaj manuskriptoj de Makarenko. Sur alia breto staras, malhel-

blue binditaj kun orliteroj, liaj verkoj, inter ili plej diverslingvaj tradukoj. Sur la muro de lia iama laborĉambro portretoj de Lenin, Stalin kaj Tolstoj, meze en libroŝranko busto de Gorkij. Ĉie en loĝejo, sur la muroj, sub la vitro de la skribotablo, multegaj fotoj. Bildoj de liaj iamaj edukitoj, el la vivo de la Gorkij-kolonio, k.t.p.—“Liaj lernantoj estis ne nur sur bildoj, sed ankaŭ reale ĉiam ĉirkaŭ li, ofte vizitis lin, kelkfoje eĉ dormis ĉe ni,



A. S. Makarenko

kun af. permeso de
Sovjet Kultura, Budapeŝto

ofte eĉ loĝis ĉe ni dum tagoj", diris la edzino. En la arte ledbindita memorlibro enskribis sian nomon kaj memorfrazojn ankaŭ eksterlandaj vizitintoj, inter ili angla laborista delegitaro antaŭ kelkdek jaroj. Nun Balina Stahijevna montris kelkajn kolorajn ledbinditajn malgrandajn poŝnotlibrojn. Sur ĉiu paĝo etliteraj notoj. "Ĉi tiuj estas la malgrandaj poŝnotlibroj, kiujn li ĉiam kunportis kaj li ĉiujn temojn, ideojn, pensojn, kiuj lin trafis, tuj enskribis. El tiuj notetoj naskiĝis liaj libroj", diris la edzino.

"Kiamaniere fariĝis la granda praktikanta pedagogo verkisto, ke li forlasis la *komunon* (eduk-kolonion), la praktikan eduklaboron, kvankam ni scias, kiom li amis tion kaj kiel malfacile li disiĝis de ĝi?", demandis Szokolovszky. La edzino esprimis la konvinkon, ke se ŝia edzo pli frue estus forlasinta la streĉan nervigan eduklaboron, li estus eble ankoraŭ inter la vivantoj, ĉar tie li perdis sian sanon.

Li komencis ankoraŭ en la Gorkij-kolonio skribi sian ĉefverkon: *La Forĝisto de la nova homo*. Sed poste li perdis la kuraĝon kaj ĉesis ĝin. "Kiel mi povus skribi, kiam mi ne estas verkisto?", diris li foje al mi—"kaj eĉ se mi havas talenton, tio estas nur pedagoga talento". Sed poste li tamen denove daŭrigis la verkadon. Li diris pardonpete: "Oni konvinkis min, ke mi devas skribi".

"Kiel pretiĝis la *Libro de la gepatroj*?", demandis Szokolovszky. La edzino respondis: "Komence li planis ĝin por kvar volumoj. Ĉiuj personoj estas en ĝi vivantaj, realaj homoj kiujn ni ambaŭ bone konis — kompreneble sub aliaj nomoj. Ankaŭ kelkaj fariĝis artistoj. Ofte venas al

mi nuntempe multaj artistoj, kiuj okupiĝas pri la arta esprimado de la amika rilato inter Gorkij kaj Makarenko. Gorkij instruis al Anton Semjonoviĉ, ke li supozas en la homo ĉiam pli multan bonon kaj belon".

Ŝi ankaŭ parolis pri la verkoj de la lastaj jaroj, pri lia grandega volforto kaj pri la mirinda altgrada celkonscio en la verkado. "Li laboris, kiel konstruisto", ŝi rakontas. "Unue li zorge, detale konstruis en pensado la verkon kaj nur tiam li komencis skribadi, kiam la opaj ĉapitroj 'estis jam pretaj en lia kapo'."

"Mi vidis la manuskriptojn de Makarenko", rakontas Szokolovszky. "Sur multcent, per perl-literoj plenskribitaj paĝoj estas apenaŭ kelkaj trastrokoj, etaj plibonigoj". Lia edzino rakontis, ke li povis verki en plej diversaj situacioj. Ekzemple unu ĉapitron de la *Forĝisto* li skribis en septembro 1930, okaze de manifestacio dum la Junulara Tago ĉe Stalino. Al la manifestacio li iris kun siaj 600 "infanoj". Dum la paŭzoj sur benkoj, sur ŝtupoj li skribis la ĉapitron *Libro de la dua volumo de sia fama verko*. Li opiniis, ke estas antaŭjuĝo havi ian specialan animstaton, inspiradon por verkadi. "Por mi sufiĉas havi kelkajn bone pintigitajn krajonojn kaj tempon, por povi koncentrigi mian atenton", li diris tiutempe. "Anstataŭ la muzo, tiam tuj aperis antaŭ mi la taŭzithara Petjka aŭ Surka, kaj jen jam estis la temo", li diris ofte. Sed kelkfoje ne estis facile por li doni finan enhavon de siaj pensoj. Lia edzino rakontis, ke foje ŝi observis, ke li sidas antaŭ sia skribmaŝino (li ĉiam mem tajpis siajn manuskriptojn) kaj videble turment-iĝas, balancante sin tien kaj reen sur la seĝo. Kiam la edzino demandis, kian malbonon li havas, li respondis

jene : “La planon pretigi estas facile. Sed unu penson esprimi anstataŭ per dudekkvin vortoj per kvin vortoj—tio ja kelkfoje estas malfacila”.

“Kia estis Anton Semjonoviĉ, kiel homo?”, demandis Szokolszky.

“Ekstreme modesta. Kelkfoje li sincere certigis, ke ekzemple la *Forĝiston* li efektive ne skribis, sed la vivo donis prete la tutan rakonton. Mankis en li ĉia pozo kaj fiereco. Sed la vorto *modesta* tamen ne tute konvenis por li. Apud lia modesteco pasie vivis en li la konvinko, ke la vojo, kiun li iras, estas ĝusta. Li sciis, ke la vojo de la novkreanto estas malfacila kaj tio ne estas kaj ne povas esti alie. Kial? Ĉar detrui la alutimitan estas tre malfacila afero. Estas senrespondecaj novigantoj. Sed en li estis nekomparebla respondecosento, kaj ĉion, kion li spertis dum sia longa laborado, li volis transdoni al sia popolo. Tri tagojn antaŭ sia morto li diris ĉe instruista kunsido: “La pedagoga arto estas la esprimo de la politika kredo de la homo, simile, kiel la arto de la verkisto”. Li estis gaja, vivĝoja homo, la malfacilaĵoj kaŭzis al li ian specialan ĝuon, li sentis sin feliĉa, kiam li povis batali kontraŭ ili.”

Ŝi ankaŭ rakontis pri tiu lia vivĉapitro, kiam li agadis dum dek jaroj kiel simpla instruisto. Li oferis multegan tempon por plibonigi, korekti la taskojn de la lernantoj kaj kun detaliga zorgo klarigis la erarojn kaj ĉe la fino de la tasko donis detalajn konsilojn, kiel oni povas estonte eviti la erarojn.


“Jen estas ankoraŭ malgranda okazintaĵo, kiun mi aŭdis ankaŭ de la vidvino, tre karakteriza pri Makarenko. Li ne havis propran infanon, sed krom la filo de sia edzino

el ŝia unua edziniĝo ankaŭ unu parencinfano estis edukata en la familio. Interalie ŝi diris al ili, ke Makarenko laboras tiom multe por ili kaj ili tamen kondutas tiel nedece. Anton Semjonoviĉ estis ĝuste en la najbara ĉambro kaj senvole aŭdis la riproĉadon. Poste li “prenis” sian edzinon por “malgranda pedagoga interparolo”. Li estis tre ĉagrenita. Li severe malpermesis, ke aliffoje ŝi povu efiki al la infanoj per tiaj argumentoj. “Ni neniam rajtas sentigi al la infanoj, ke ni oferas por ili”, li diris. Fine ŝi rakontis pri la fama Makarenko-laboratorio, kiu okupiĝas pri la studado de la vivo kaj agado de Makarenko. En la lasta tempo la vidvino mem gvidis la laboratorion, kiu eldonis liajn verkojn en sep volumoj. Depost ŝia malsano ŝi vivas en la provinco kaj nun V. A. Veiksan gvidas la laboratorion, kiu nun studas kaj direktas la praktikan aplikon de la spertoj de Makarenko en la sovjetaj lernejoj.

Antaŭ la adiaŭo Galina Stahijevna dirigis al Szokolszky per la interpretistino, ke li ne pensu, ke ŝi ion troigis pri sia edzo. Ŝi estas konvinkita pri tio, ke Makarenko estas la homo de la estonto.

“Kaj ŝi estas prava”, aldonas Szokolszky. “Ankaŭ en tio ŝi pravis,” li rimarkas, “ke Makarenko pli multe utilis per sia verkista agado, ol se li estus laborinta ĝis sia vivfino, kiel pedagogo, en infankolonioj. Tiam li eble estus edukinta kelkcent pli da valoraj civitanoj por sia patrujo. Sed tiel per siaj libroj li tra la tuta mondo, kie laboras progresema edukistoj, helpas sukcesigi la edukadon de la junularo”.





Enigma Konkurso N-ro 100

Per tiu ĉi enigmo S-ro P. H. Mooy adiaŭas la legantojn kiel gvidanto de nia enigma fako. Dum multaj jaroj li estis konstanta kunlaboranto de nia revuo. Sed nun, post pretigo de ne malpli ol cent (100) enigmoj li demisias, ĉar la cifero 100 ŝajnas al li taŭga finaĵo kaj ĉar li atingis 72 jarojn. Ni esprimas al S-ro Mooy varman dankon pro lia longa kaj meritita servo kiel ankaŭ pro la amuzaĵo kaj instruo, donita al niaj legantoj. Ni kaptas la okazon samtempe kore gratuli amikon Mooy je lia 72-jara jubileo.

Ernfrid Malmgren, Prez. de U.E.A.

Solvoj :

N-ro 221 : En dom' de pendigito pri ŝnuro ne parolu. guverni - spinaco - prediki - binoklo - permuti - borderi - penetri - trapezo - kliento - burnuso - pardonni - kuniklo - brigado - kolibro - kantado - rikolto - kompas - metriko - ĉapitro - forŝovi - krenelo - banurbo - dekreto - rekordo - kvinope - paletro - remparo - kobalto - papriko - manovri - deklami - tumulto.

N-ro 222 : Pli kostas la sako ol la pako. rimeso - forumo - debato - telero - aparta - torako - likeno - peltan - komuto - kinino - rikano - pirato - kolori - adreso - regali - ergino - karoto - mateno - koloro - argano - karesi - korano - merito - rilato - armilo - ordono - libelo.


Gajnis la premiojn post kontrolo de la 96-a konkurso: S-ro V. Monsalve (Hisp) 115, S-ino M. Koudys-Modoo (Ned) 114, S-ro F. Couwenberg (Belg) 113 p.

Enigmo N-ro 225 : a - a - a - a - al - am - ba - be - ber - bro - bu - cer - ci - ci - ĉi - de - di - di - din do - do - do - do - do - e - en - et - fi - fo - gi - gi - gi - go - gra - gra - in - in - is - jek - ka -

ko - ko - ko - kro - ku - ku - kvi - kvi - la - le - lis - lo - lo - lo - lo - lo - lo - lo - ma - me - me - mi - mi - mi - mis - mo - mo - mo - na - ne - ne - neŭ - ni - no - no - no - nu - nu - o - o - o - o - o - o - o - ob - of - pe - per - pul - ra - ra - ran - ras - re - re - ro - ro - ro - ro - ro - sa - sa - sa - su - ŝa - ta - tal - te - te - ti - ti - ti - ti - ti - to - to - to - to - to - to - to - tra - tri - tru - tu - tu - va - va - ve - vem - vo - vo - za - zi - zi - zo.

El la ĉi-supraj 140 silaboj faru laŭ la ĉi-subaj klarigoj 30 vortojn, kies komencliteroj formas esprimon el la Proverbaro de D-ro Zamenhof.

1. kompara formo ; 2. komika aktoro ;
3. urĝa rapida sciigo ; 4. eklezia tribunalo ; 5. timata bacila malsano ;
6. oficiala reprezentanto ; 7. biciklo ;
8. monumento, plej ofte el unusola ŝtono ; 9. jako ; 10. juĝistaro ;
11. bazita sur senpartia esploro ;
12. teatraĵo kun feliĉa fino ; 13. ekzekutejo ; 14. parto de frakcio ;
15. hispana batalanto ; 16. mal-egoismo ; 17. pastro supera je diakono ;
18. biografia raporto ; 19. scienco pri la popoloj ; 20. scienco pri moneroj kaj medaloj ; 21. membro de 4 ;
22. inflamo de l' okulo ; 23. monato ;




Du-kolora ilustrita faldprospekto estas senpage ekhavebla ĉe La spiritscienca instituto de Martinus, Mariendalsvej 94-96, Kopenhago F., Danujo.

Perdo sur perdo.—*En Haarlem perdiĝis libro "Nederlando, miraklo el la akvo", donacota al la Prezidanto kun subskribaro de la komitatanoj. En Februaro ni ricevis pri tiu perdo alvokon, kiu perdiĝis siavice ĝis Junio ... Do nun ni afable petas ĉiujn, kiuj posedas la supran libron, kontroli ĉu sur la unua paĝo ne troviĝas multaj subskriboj kun dediĉo al la Prezidanto. Pri trovo bonvolu avizi la Centran Oficejon.*

24. grava deklinacia kazo ; 25. aroma vegetaĵo uzata kiel spicaĵo ; 26. scienco pri la insektoj ; 27. nervmalsano ; 28. dika araneo ofta en Italujo ; 29. supera lernejo ; 30. rusa tepoto.

Enigmo N-ro 226 : Grafika kuriozaĵo. Kiu povas legi tion ?

Ensendis S-ro J. Calado, Roterdamo.



Jean Ribillard



La bildo prezentas la aŭtoron de **Vagado sub Palmoj** kiel majoron de la Afrika Armeo (la franca Fremdula Legio).

Prospektoj :

Cremona. La Internacia Lernejo pri Violonfabrikado. Ilustrita prospekto kun 5-lingva teksto. Eld. Ente Provinciale Turismo, Cremona.

Milano. Kolora prospekto kun urboplano. Senpage ricevebla ĉe E.P.T., Via Case Rotte 3, Milano.

Aŭto-Pramŝipo Fredrikstad — Larvik — Frederikshavn. Bildprospekto kun horaro kaj prezoj, havebla ĉe A.S. Larvik-Frerikshavnferjen, Poŝtboks 2443, Oslo.

Irlando. Informoj por vizitontoj. Bildprospekto kun tre helpaj sciigoj. Havebla ĉe 14 Upper Connel Street, Dublin.

Stuttgart. Tre bela, granda faldfolio kun bildoj koloraj kaj monokromaj, kaj grandaj planoj. Eldonejo ŝajne Stuttgart, Stresemannstrasse 4.

Vagado sub palmoj

Antaŭ ekiro . . .

Vi okazeble suferas pro marmalsano, sunfrapo, rendoloro aŭ fuŝkuraĵo kiam vi foren vojaĝas. Tial komforte sidanta kun taso da teo ĉemane, kaj en la buŝo taŭge plenŝtopita pipo, vi preferas imagi agrablan ekskursadon en nekonata regiono. Laŭ komplezema fantazio vi elektas pitoreskan landon, kie vi vagadas sen laciĝo, sen kontraŭaĵo. Vi vin ne embarasas per valizo, promenas kien vi decidas, haltas kiam vi bezonas, gustumas kion vi ŝatas. Kaj se hazarde al vi ne plaĉas la pejzaĝo, tro longa vi juĝas la vojon aŭ enuigaj la kunvojaĝantojn, vi tuj ĉesigas la veturiradon, galope hejmen revenas kaj retrovas malvarma vian teon kaj senfajra vian pipon. Ne grava estas la domaĝo.

Mi proponas, ke mi tiamaniere konduku vin tra la Okcidenta Saharo.


Ni kune vizitos kelkajn oazojn, verdire iom rapide; sed promenante laŭlonge de la sablodunoj, ni ie kaj ie paŭzos por koniĝi kun Sinjoro Mohamed kaj Sinjorino Jamina, surprize rigardi pikan scenon aŭ ŝtele aŭskulti malicetan klaĉon.

Cetere vi povos salti de iu oazo al alia, ne sekvante la gvidiston, aŭ preterpasi banalan spektaklon, aŭ ripozi antaŭ kvietiga vidaĵo. Eĉ simple forlasi la tedan babilemulon kaj reŝanĝi vian pipon.

Sidiĝu, mi petas. La gvidonto deziras komence prezenti la landon, kien ni veturos kaj unu bonan amikon, kiun ni ofte renkontos.

Jen li tuj levos la kurtenon . . .

*Tiel komenciĝas la absorba kaj amuza kroniko de **Jean Ribillard**. La rakonton ni daŭrigos en sekvontaj numeroj de "Revuo Esperanto".*



Du intervjuoj



Jen **Raymond Schwartz**, kun vinbotelo,
La ĉarma an' de Epikur'.
La Verdán Katon, ho terur' !
Li pikis morta per ombrelo.

Kaj post la streĉ' de l' kata felo
Li testamentis per tambur' . . . *
Jen *Raymond Schwartz*, kun vinbotelo,
La ĉarma an' de Epikur'.

En verso, ŝerco kaj novelo,
Grimaco kaj karikatur'
Ni ĉiam sentas kun plezur'
Aromon de la moskatelo.

Jen *Raymond Schwartz*, kun vinbotelo !

K. Kalocsay : Rimportretoj



Waringhien—vortsencojn fiksas,
Kolektas riĉajn sinonimojn,
Abundajn Zamenhof-esprimojn
(Ilin la SAT-vortar' ampleksas).

Malnovan ritmo-kodon fleksas
Por plivastigi striktajn limojn,
Waringhien—vortsencojn fiksas,
Kolektas riĉajn sinonimojn.

Lertarte li en versoj miksas
Agordojn al la puraj rimoj.
Ĉu ne sekvindaj rimkutimoj ?
Jes ! Ankaŭ mi agordojn teksas :

Waringhien—vortsencojn fiksas.

K. Kalocsay : Rimportretoj

LA Redaktoroj de *Esperanto* petis min, verŝajne nur pro mia Parizaneco, intervui miajn amikojn Gaston Waringhien kaj Raymond Schwartz pri aktualaĵoj. Estis por mi agrabla tasko, tiom pli facila, ke al mi sufiĉis primanovri ilin, tamen unu post la alia, en anguleton

de *La Tri Koboldoj*, kaj ilin ne ellasi, ĝis ili sputis la deziritan kontribuaĵon.

“Al la Sinjoro estu la honoro” skribis Zamenhof. Mi do unue premas la tiean mastron, kaj jam pafas al Raymond Schwartz :

Oni deziras scii, kio precize estas La Tri Koboldoj, kies famo nun

* *La Verda Kato* estis nomo de la antaŭmilita Esperanta kabareto de Schwartz. La versaĵojn li poste kolektis en la sensacie sprita libro : *La Verdakata Testamento*, kies kovrilo montras katon mortpikitan per ombrelo.

etendiĝis al la tuta mondo. Tio ĉi ne estas troigo: ĉu ne vizitis ĝin Esperantistoj el Usono, Aŭstralio, Novzelando kaj eĉ Japanujo? Kiel ni difinu ĝin?

Sub la ŝildo de kabareto, *La Tri Koboldoj* estas ankaŭ kunvenejo por praktikantoj de la lingvo. Por praktiki kaj perfektigi oni bezonas ja pli ol nuran legadon, nome vivantan kontakton. Kaj tio estas tiom pli vera, ke jam post interŝanĝo de nur kelkaj frazoj vi tuj scias, ĉu via kunparolanto estas vivanta aŭ nur papera Esperantisto.

Estas konate, ke en Esperanto oni ankoraŭ ne sufiĉe ellaboris ĉiujn eblecojn de la lingva vivanteco, ĉefe kiam temas pri ĉiutagaĵoj. Libro ĝenerale, kaj tute nature, cetere, uzas pli akademian stilon. El tiu ideo naskiĝis inter ni la bezono pri ĝojaj kontaktoj.

—*La Tri Koboldoj estas tamen kabareto.*

Jes, ankaŭ kabareto, en la Esperanta senco, nome, laŭ la *Plena Vortaro*, “malvasta trinkejo, kie poetoj kaj kantistoj diras siajn proprajn verkojn . . .” Havi tian “malvastan trinkejon” estas grave ĉiufoje, kiam temas pri verkoj pli speciale destinitaj al surpodia prezentado, ĉar tiam oni bezonas la ĝustan etoson, kiel dirus K. R. C. Sturmer.

Jes, kaj mi komprenas, ke tio koncernas ĉefe la kantojn kaj kanzonojn.

Sendube. Ni ja prave fieras, ke ĉiu franclingva kanzono, apenaŭ famiĝinta, jam ricevas ĉe ni sian Esperantan vestaĵon. Ĉu vi memoras, ke lastan jaron ni ricevis de tri diversaj flankoj la tradukon de tiu plaĉa “Arbaro de Chaville”?

Kaj ni adoptis la plej bonan, kiu

estis cetere de nia Benjamenino.

Benjamenino, kiu nomiĝas Jean Thierry. Tiel, ni ofte havis la okazon ĉeesti la naskiĝon aŭ pluevoluon de kelkaj talentoj. Eĉ se nur pro tio, ni ne perdis nian tempon.

Kelkfoje estas ne malagrabla perdi sian tempon!

Dependas kie. Certajn merkredojn, kiam ni ne “produktas”, ni tamen havas purelikŝiran ĝuon, kiam en la rondo de niaj kernuloj, kiaj Waringhien, Lucien Laurat, nia internacia Flego, vi mem kaj multaj aliaj, ni sencele blagas, abomene klaĉas aŭ skermas per ideoj pli aŭ malpli misŝraŭbitaj.

Do ni restas konvinkitaj, ke nia kunvenejo estas utila.

Nepre! Ne nur, ke ĝi donas al multaj la okazon prezenti siajn verkojn, originalajn aŭ tradukitajn, antaŭ komprenema publiko—Barthelmes antaŭ nelonge uzis nian eksperimentejon por vidi la efikon de liaj plej bonaj tradukoj el la dua parto de Faŭst, kun granda sukceso, cetere—sed ĝi estas ankaŭ la stabila alirpunkto por ĉiuj, en- kaj eksterlandanoj, en la moviĝanta fluo de la Pariza Esperanto-vivo. Fakte, de pli ol kvin jaroj jam, seninterrompe ĉiumerkrede la Koboldejo funkcias.

Ĉu vi ne pensas plue, ke niaj fidelaj klientoj multe profitis de siaj oftaj vizitoj? Mi konstatis, ke multaj faris grandajn progresojn koncerne rapidan komprenon de ŝercoj, de versoj, de kantotekstoj k.t.p.

Ni diru ankaŭ, ke la kabaretkunvenoj estas la plej taŭga propagand-formulo. Ne fari reklamon, sed praktike uzi la lingvon! Ĉiumerkrede la dubantoj pri la parolebleco de Esperanto havas la okazon konvertiĝi. Kiomfoje Lucien Laurat alkondukis tiajn Tomasojn . . .

. . . *kiuj, ĉe la foriro, estis sufiĉe ĝentilaj por konfesi sian ĝisnunan eraron.*

Kaj nun ni atendas la viziton de Sinjoro Blinkenberg !

Tiu fama delegito, kiu en Montevideo asertis, ke Esperanto ne estas lingvo ! Kaj se li venus, ĉu vi kantus vian kanzonon pri Blinkenberg ?

Certe ne ! Ĉar ni restu nepre ĝentilaj, eĉ kontraŭ stultuloj !

* * *

Mi nun lasas mian unuan viktimon kaj tuj persekutas la duan, Prof. Waringhien :

Laŭ onidiroj, Doktoro Kolomano Kalocsay reaperas, post plurjara silentado, sur la scenejo de la Esperanto-movado. Kion vi scias pri via malnova "komplico" ?

Fakte, jes—jam de pluraj jaroj mi nenion aŭdis de li kaj tiu silento estis al mi tre ĉagrena, ĉar, malgraŭ la malsameco de niaj lingvoj kaj profesiaj medioj, ni ĝis tiam formis unu kazon de intelekta simbiozo, kiel iam diris amiko Rotkvić, kaj tia pensa komuneco ĉesigas ne sen doloro. Vi povas do imagi kun kia ĝojo mi ricevis leteron de li iom antaŭ la Harlema kongreso. Li eksciis, verŝajne pere de ĉeĥaj Esperantistoj, pri eventuala reeldono de la "Plena Gramatiko", pri kiu ni kune laboris antaŭ jaroj. Mi povis konstati, ke li ŝajnas informita pri ĉio ĵus okazinta en la Esperanto-movado, kaj ke li neniam forlasis la Esperanto-kampon, malgraŭ longa silentado ŝuldata kredeble al granda okupiteco kaj gravaj laboroj : efektive li sendis al mi novajn tradukojn de kelkaj pecoj el *La Floroj de l' Malbono*, de Baudelaire, kiuj pruvas, ke li re-ellaboris, t.e. pliperfektigis siajn

antaŭajn tradukojn. En tiuj lastaj relaboraĵoj, li evidente celis al ĉiam pli granda proksimiĝo al la originala teksto.

Tiu momenta malapero estas do tute ne simila al la definitiva forlaso, el niaj vicoj, de la pioniro Kabe—pri kio li siatempe verkis tiel melankoliplenan rondelon.

Tute ne ; kiel mi ĵus diris, lin nur provizore silentigis verŝajne "manko de tempo". En dua letero li komunikis al mi ankaŭ originalajn poemojn, kun la sama inspiro kiel en la postmilita "Literatura Mondo", kaj kontribu-aĵojn al re prilaboro por la nova eldono de la *P.G.* Kontakton kun la okcidenta mondo li certe ĉiam konservis pere de la franca beletra gazeto "Les Lettres Françaises".

Laŭ via opinio, kiun signifon por Esperanto havos tiu reapero de nia "papo" el Budapeŝto ?

Tre *gravan* signifon. Unue, sur la literatura kampo, li sentos sin jam ne "poeto sen popolo". Tre certe, tuŝis lin la naskiĝo kaj evoluiĝo de la t.n. skota skolo, kies anoj agnoskis sian pian filecon al la vera patro de la Esperanta originala kaj traduka poezio. Post la milita periodo, dum kiu ĉiu devis silenti, kaj silentis ankaŭ iamaj lingvaj kaj teoriaj diskutoj, oni nun denove rigardas lin kiel *la* kolono de la templo de la Esperanta literaturo.

Krome, sur la lingva kampo, mi pensas, ke la reapero de K. havos tre favoran efikon sur la lingvon, ĉar li denove enkondukos en ĉiujn lingvajn problemojn la vidpunkton de plej granda spertulo, kaj ĉefe, de spertulo, kies gepatra lingvo estas ne hindoeŭropa. Tiu efiko tiele kontraŭbalancos tre bonvene la nunan troan "ĝermanismon" de multaj Akademianoj.

Kiel, praktike, efektiviĝos tiu efiko ?

Nu, en la komenco, per la publikigo, en la nun baldaŭ (?) aperonta *Nica Revuo*, de parto de liaj ankoraŭ ne konataj originalaĵoj kaj tradukoj. Poste, per la reeldono, iam kaj iel certe okazonta, de la *P.G.*, kun multaj novaj liaj rimarkoj, kaj unuvorte ĝisdatigo de la ĉefaj lingvaj kaj gramatikaj problemoj. Kaj fine, mi ne malesperas allogi lin al grandioza laboro super la verkoj de poetoj, kiel Heine aŭ Rimbaud.

Belege ! Mi devas diri, ke mi senpacience atendas—kaj certe ne nur mi !—la eldonon de La Floroj de l'Malbono, promesitan jam antaŭ la milito. Ĉu vi iom povas perfidi pri tiu Nica Revuo ?

Nun, nur tion, ke mi sukcesis certigi al ĝi la kunlaboradon de la plej multaj el la eksaj kunlaborintoj de *Literatura Mondo* ankoraŭ nun vivantaj, kaj ke ni faros iom post iom ĉion eblan por ke ĝi rememorigu pri nia kara neanstataŭigebla *Literatura Mondo*.

Vi do estas optimisto, kara amiko ?

Mi pensas, ke tute ne prava estas la nuna vidpunkto de multaj instancoj en nia eldonista aŭ gazetara mondo, nome, ke vane estas entrepreni por nia limigita publiko, cetere inerta kaj pasiva. Tio estas ne objektiva fakto. Ni devas konsideri la publikon, ne kiel objekton, nemoveblan, sed kiel vivantan estaĵon pli-malpli allogatan de la “nutraĵo” proponita al ĝi. Ekz. antaŭ du jaroj oni konsideris stulta la eldonadon de nur poezia libro, kiel *Kvaropo*, kaj tamen, en la daŭro de unu jaro, vendiĝis pli ol 1,000 ekzempleroj de tiu libro. Ŝajnas, ke la regantaj medioj subtaksas la pretecon de Esperantistoj aĉeti librojn, eĉ multekostajn, kondiĉe ke la enhavo estu valora. Mi alkroĉas multe da

praveco al tiu rimarko de Raymond Schwartz, ke, se oni komparas la t.n. “propagandistojn” kaj la literaturistojn, oni devas konfesi, ke ĉi tiuj lastaj atingis rezultatojn multe pli konkretajn ol la unuaj.

Kiajn reagojn vi registris post la apero de la Suplemento al Plena Vortaro ?

Tiuj reagoj ĝuste ilustras, kion mi ĵus diris. Multaj angloj kaj francoj plendis pri la troa “latinideco” de multaj el la novaj terminoj—kiujn mi cetere ne elpensis, sed nur kolektis el la jam aperintaj artikoloj aŭ verkoj de fakuloj—dum ekz. ĉeĥoj kaj jugoslavo, kiuj devas dediĉi certan penon por lernado de radikoj ofte fremdaj al ilia lingvotrezoro, esprimis sian dankon pro la riĉigo de nia vortaro.

Tiuj angloj kaj francoj ŝajne ŝatus limigi sin al la banala lingvo de la “Bonan-tagon”-uloj. Mi male substrekas, ke oni devas doni rajton al la literaturo, kaj plene fidi al la energio kaj spiritokapablo de la Esperantistoj.

. . . .

Kaj tiel plenuminte mian taskon, mi tuj petas de la tre ĉarma kelnerino, glason da biero.

La intervjuinto :

Roger Bernard

★————★————★

***En la venonta numero aperos
intervjuo kun
Kolomano Kalocsay***

Verkoj, kiujn la publiko kaj la kritiko unuanime akceptis plej favore
D-RO IVO LAPENNA
Profesoro de Internacia Publika Juro

Institut de Droit Comparé de l'Université de Paris

CONCEPTIONS SOVIÉTIQUES de DROIT INTERNATIONAL PUBLIC

Préface de S. Bastid, Professeur
à la Faculté de Droit de Paris
Paris, 1954

Publié avec le concours du
Centre National de la Recherche Scientifique
Editions A. Pedone p. 324

13, Rue Soufflot, Paris V., France

Prix de vent 1.800 fr. ; frais de port : France 160 fr., Etranger 200 fr.

“ . . . so excellent, dispassionate and thorough in its survey of the considerable Soviet literature on international law that it easily supersedes the little that has been written on the question by United states and British scholars”

International Affairs (Royal Institute of International Affairs), London

“Ces quelques citations ne peuvent donner qu'une idée faible et imparfaite de la valeur et de l'importance de l'ouvrage du professeur Lapenna” *B.E.I.P.I.*, Paris

“Il grande interesse di questo studio è insito nel suo stesso oggetto. L'autoro da parte sua, in linea di massima, presenta bene le tesi della dottrina sovietica . . . ”

Rivista di Diritto Internazionale, Roma

“Die wiedergegebenen, systematisch geordneten Lehren . . . bilden ein Ganzes, das in der gegenwärtigen Völkerrechtsdoktrin nicht ignoriert werden darf . . . Man möchte wünschen, in der seit einigen Jahren zunehmenden Literatur über sowjetisches Recht durchweg so zuverlässige und nüchterne Werke zu finden”

Zeitschrift für Ausländisches Öffentliches Recht und Völkerrecht

RETORIKO

“Ĉi tiu libro estas unu el la plej valoraj, kiuj estas ĝis nun eldonitaj en nia lingvo”
Heroldo

“Trezo de nia literaturo”

Norvega Esperantisto

Parizo, 1950

p. 216

Prezo 12 ŝil.

AKTUALAJ PROBLEMOJ

“La verko majstre instruas kaj instigas al pensado”
Scienca Revuo

“Bele kaj plaĉe prezentita, ĝi estas altvalora laŭ enhavo”
Sennaciulo

Roterdamo, 1952

p. 144

Prezo 12 ŝil.

LA INTERNACIA LINGVO – FAKTOJ PRI ESPERANTO

“Ĝi posedas grandan valoron pro sia kompleteco . . . koncizeco kaj fidindaj faktoj kaj ciferoj. Libro, kiun bezonas ĉiu esperantisto”
Heroldo

“This is an extremely interesting and important book”

British Esperantist

Eldono de C.E.D., Londono, 1954

Lukse bindita, p. 192

Prezo 10 ŝil.

Mendu ĉe : **UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO**


Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo aŭ ĉe enlanda libroservo



Tibor Sekelj

Jen SEKELJ, kies scivolem'
 kondukas lin en strangajn vojojn ;
 li riskas sian vivon mem,
 sed disdonacas siajn ĝojojn
 kaj sciojn, verve, malavare,
 dum ĉarme li al ni prelegas—
 ni, kiuj vivas ordinare,
 kaj en sekuro rutinegas :
 li venas, por ke ni pli sentu
 la gloron de la panoram'
 de l' mondo ; do, mi lin prezentu—
 sed hop ! li malaperis jam !

Marjorie Boulton




Mason Stuttard, K.K.S.

KIU FRUAS
 EN LA ROSO ?
 De mateno ĝis vespero
 gaje kuras sur la tero :
 LA KO-KO-SO !

KIU DRIVAS
 SUR LA FLOSO ?
 Por vivigo, por instigo,
 de la digo al la digo :
 LA KO-KO-SO !

KIU MAJSTRAS
 PRI L' KAOSO ?
 De la lando al la lando
 propagando laŭ komando :
 LA KO-KO-SO !

Stefo Urban



Radio

Ĉiujn informojn pri radio sendu al S-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, PARIS 16, Francujo.

En la tabelo horoj de la dissendoj estas laŭ la horsistemo de Greenwich. Por Mez-Eŭropa tempo oni aldonu unu horon.

Mallongigoj : I=Informoj, P=Parolado, K=Kurso.

Dimanĉo	23.00–23.30	Bilbao. 265m. P. Radio Bilbao, Hispanujo.
Lundo	12.30–13.00	La Coruña. 250m. P.K. Radio Juventud, Real 71, La Coruña, Hispanujo.
	22.45–23.00	Hilversum. 298m., 188m. P. N.C.R.V. Schuttersweg 8, Hilversum, Nederlando (nur unu fojon ĉiumonate).
Mardo	11.55–12.00	Bern. 48.66m., 31.46m., 16.87m. P. D-ro Baur. SRG, Kurzwellendienst, Neuengasse 23, Bern.
	14.30–14.45	Montevideo. 280m. P. Radio Ministerio Ganaderia y Agricultura, Montevideo, Urugvajo (nur la unuan mardon de ĉiu monato).
	14.50–15.00	Ljubljana. 327m., 211m. K. Radio Ljubljana, Jugoslavujo.
	17.35–17.40	Bern. 48.66m., 31.46m., 16.87m. P. D-ro Baur.
	19.15–19.30	Carlet. 288m. I. Radio Carlet (Valencia), Hispanujo.
Merkredo	15.30–15.40	Wien. 203m., 48m., 41m., 30m., 25m.
	16.00–16.10	Caramulo. 205m. I. Rádio Polo Norte, Caramulo, Portugalujo.
	18.10–18.25	Roma. 49.92m., 31.33m. P. S-ro Minnaja. Radio Roma, Casella postale 320, Roma, Italujo.
	22.05–22.15	Wien. 513m., 48.74m., 25.46m. I. Radio Wien, Argentinierstr. 30a, Wien IV, Aŭstrujo.
	22.15–22.20	Hilversum. 402m. I. V.A.R.A., Heuvellaan 33, Hilversum, Nederlando.
Ĵaŭdo	06.45–06.50	Perpignan. 202m. K. Radio Perpignan-Roussillon, Perpignan (Pyr. Or), Francujo.
	08.30–08.45	Paris. 348m. K. Esperanto-Office, Orléans (Loiret), Francujo.
	11.55–12.00	Bern. Kiel marde. P. D-ro Privat.
	17.35–17.40	Bern. Kiel marde. P. D-ro Privat.
	22.30–23.00	Valencia. 200m. I.K. Radio Alerta, Colón 11, Valencia, Hispanujo.
	22.45–23.00	Zagreb. 264m. I. Radio-Zagreb, Jugoslavujo.
Vendredo	18.10–18.25	Roma. Kiel merkrede. P. D-ro Musella.
	19.15–19.30	Carlet. Kiel marde.
	21.30–21.45	Guatemala Cd. 370m., 197m., 47m., 30.50m. I. Radio Esperanto, La Voz de Guatemala, Gvatemalo, Mez-Ameriko.
Sabato	08.30–09.00	Rio de Janeiro. 375m., 30.7m. K.I. Radio Ministério da Educação, Rio de Janeiro (DF), Brazilo.
	18.45–19.00	Barcelona. 360m. I.K. Radio Unión, Emisora del Frente de Juventudes, Barcelona, Hispanujo.
	22.15–22.20	Hilversum. 298m., 188m. P. K.R.O., Emmastraat 52, Hilversum, Nederlando.

Radio Roma. 1.VII, La urbo de la Int. Kongreso de la Junularo : "l'Aquila" ; 6.VII, Mondo Esperantista ; 8.VII, Leterkesto kaj bibliografio ; 13.VII, Novaĵoj el Italujo ; 15.VII, Komentado pri la programo de la 40-a U.K. de Esperanto ; 20.VII, Festivalo de la Napola kanzono ; 22.VII, Fabelo de Andersen "La Fino" ; 27.VII, Ravenna, celloko de kongresa ekskurso ; 29.VII, Itala arta urbo Reggio Calabria.


Somera humoro




Pri kio vi plendas nun, Joĉjo? Vi ĉiam estas grumblanta.



La malriĉulo al kiu ni donis pecon de la torto, kiun vi faris, petas iom da bikarbonato.



Estas mirinde, ke ankoraŭ estas personoj kiuj ne kredas je flugteleroj.



Estas hontinde, ke viro juna kaj forta kiel vi petas almozon anstataŭ labori.

—Sinjoro! Mi ne petas konsilojn sed almozon.



Esperantista Vivo

Naskiĝo

Hromas. Al geedzoj Miroslav kaj Ruza Hromasovi el Hradec Kralove, Ĉeĥoslovakujo, naskiĝis unua filineto Lenda.—Feliĉon!

Geedziĝo

Badré-Legret. Je la 16a de Aprilo en Aprilo en Vaudry apud Vire, Francujo, Paul Badré kaj F-ino Claudine Legret.—Bondezirojn!

Honorigo

La Londona *Times* de la 9-a de Junio informas, ke S-ro **Harry Holmes** ricevis altan honorigon: li fariĝis Oficiro de la Brita Imperio (O.B.E.). Sinjoro Holmes estis longjara prezidanto de la Londona Esperanto-Klubo kaj ankaŭ hodiaŭ li estas unu el la plej elstaraj kaj agemaj britaj esperantistoj. Al lia morala kaj financa helpo la Centro de Esploro kaj Dokumentado unuavice dankas sian formiĝon en 1952. Hodiaŭ li estas aktiva kunlaboranto de tiu institucio de la Esperanto-Movado. Al multnombraj gratuloj aldoniĝas la tutkoraj de Universala Esperanto-Asocio, kies dumviva membro li estas.

La Urugvaja Esperanto-Societo proklamis Prof. **Fernández Menéndez** kiel Honoran

Prezidanton, kiel dankesprimon por liaj grandaj servoj multjaraj kaj precipe por la alta kontribuo, kiun li faris okaze de la venko ĉe Unesko. Prof. F. Menéndez estas esperantisto el 1908, kiam ĉe la Barcelona U.K. li havis la honoron premi la manon de la Majstro.



Nekrologo

Lahens. En Parizo, Henri Lahens, dumviva membro de U.E.A.

Liebeck. La 17an de Majo je aĝo de 70 jaroj, nia peranto en Sudafriko (kaj delegito en Kapurbo) D-ro S. Liebeck, post mallonga malsano. Dumviva membro de U.E.A. Al lia edzino niajn korajn kondolencojn.

Pierce. Je 19.I.55 pastro John Pierce, delegito depost 1946, en Marian Glas, Anglesey, Britujo.

Jakob Schmid. Je la 2a de Junio 1955 forpasis en Berno samideano Jakob Schmid, atinginte 86 jaraĝon. La mortinto apartenis al la dua generacio esperantista kaj ĝis alta aĝo partoprenis la movadon en sia lando. Sekretario en la departemento pri ekonomio (ministerio), J. Sch. sukcese laboris en registaraj rondoj, verkis lernolibron por germanlingvanoj, tradukis aron da tekstoj el svisa literaturo, kunlaboris ĉe *Svisa Antologio* kaj alie. Li estis ano de la Lingva Komitato dum serio da jaroj kaj okupis honorpostenojn en la svisa movado, interalie kiel prezidinto de la Svisa E-Societo.


Al lia familio ni esprimas sincerajn kondolencojn.
H.J.

Donacoj por CED

	£	ŝ.	p.
Stato la 3-an de Majo 1955 ..	134	11	2
S-ro D. Kennedy, Britujo (3-a donaco) ..	5	0	0
La Verda Kolombejo, Hispanujo	18	6	
S-ro W. Spaander, Nederlando ..	18	3	
Svisa Esperanto-Societo, Svislando ..	11	8	6
Stato la 7-an de Junio	£152	16	5

Al ĉiuj donacintoj koran dankon. Donacojn por CED oni povas sendi al UEA, Rickmansworth, aŭ al Unuiĝo Esperantista Franca, 34 Rue de Chabrol, Paris X, aŭ al CED mem.

En la recenzo de la Fundamenta Krestomatio S-ro Waringhien atentigis pri la stranga inercio de la Esperantista Centra Librejo, kiu lasis elĉerpiĝi preskaŭ ĉiujn verkojn de Zamenhof, kies ekskluzivan eldonrajton ĝi pretendas. De tiam, la E.C.L. decidis ekagi, sed ne en la supozata direkto: per interveno de la polico, ĝi konfiskigis la ekzemplerojn de la F.K. ĵus alvenintajn en la sidejon de U.E.F. Estas evidente nenio dubo, ke antaŭ la tribunalo la pretendoj de la E.C.L. plene fiaskos, sed ĝis la tempo de tiu juĝa decido, kiu povas longe prokrastiĝi, la vendado de la F.K. estas malhelpata sur la franca teritorio. Kurioza agmaniero por firmo, kiu laŭnome estas "centra" apogilo de la Esperanta Movado!



Novaj Libroj

Duope ricevitajn verkojn ni recenzas ;
unuope ricevitajn ni nur mencias.

*=*ricevebla ĉe U.E.A.*

***Fran Levstik : Martin Krpan.** Trad. Jože Kozlevčar. Ilustris kaj ornamis : Tone Kralj. Eld. : Eld. Sekcio de Slovenia Esperanto-ligo, Ljubljana, 1954. Prezo 11ŝ. plus afr. 7p.

En postparolo en tiu ĉi libro oni informas, ke Fran Levstik (1831-1887) estis centra persono de slovena kultura kaj publika vivo en la dua duono de la pasinta jarcento, poeto kaj verkisto, literatura kritikisto, ĵurnalisto kaj redaktoro de la unua slovena satira revuo.

Martin Krpan estas meze longa fabelo de popolfabela karaktero. En la postparolo oni diras, ke ĝi estas kreita el la materialo de pluraj popolaj fabeloj. Tio ne signifas, ke temas pri rerakontado. Ŝajne la aŭtoro plene sukcesis en tiu arto, en kiu nur H. C. Andersen kaj kelkaj malmultaj aliaj fariĝis majstroj : rerakonti fabelojn tiel, ke ili fariĝas memstaraj spiritaĵoj majstroverkoj de la verkisto.

Martin Krpan estis simpla kamparano, giganta laŭ staturo kaj forto, simpatia kaj bona homo kaj ankaŭ honesta, kvankam li parte vivis de kontrabandado. Sed estis sufiĉe honesta kaj bonfara kontrabandado, nome de salo.

Al Vieno, la ĉefurbo de la imperio, venis iu grandegulo, kiu invitis ĉiujn imperiajn heroojn al batalo, mortigis unu post la alia kaj minacis la imperiestron kaj la imperion. En tiu danĝero oni vokis Martin Krpan.

Li venis kaj post diversaj preparoj batalis kun la grandegulo kaj venkis lin. Ĉio estas simple koncize kaj plenvive rakontita, kun multe da bonhumoro, multe da sperto pri homoj kaj la homa naturo. Kaj meze en ĉio staras kaj iras kaj agas tiu bona kaj vere admirinda Krpan, nenion timanta, forta kaj firma kiel roko. Krpan estas la korpe kaj mense memstara homo, kiu klinas sian kapon antaŭ neniuj krom sia kreinto, kaj malgraŭ sia kontrabandado li vivas honeste kaj juste. Leginte la libron oni plene memoras ĉiun detalon de la rakonto, oni ĝojas, ke oni renkontis la bravan Krpan, kaj oni ne forgesos lin.

Al la impreso de la libro ne malmulte kontribuas la bildoj. La libro estas nedika sed grandformata, 29.5 × 24.5 cm. Alternas en la libro tekstopaĝoj kaj tutpaĝaj koloraj ilustraĵoj—30 tiaj, se mi ne kalkulis erare—krome troviĝas bonaj vinjetoj sur multaj el la tekstopaĝoj. Mi trovas, ke ili plene egalas al la vorta rakontado kaj estas kvazaŭ unu animo kun ĝi. Ŝajnas al mi ke ili siaspece estas same granda arto kiel tiu de Levstik.

Tiun libron mi ofte legos kaj rigardos. Aĉetu ĝin kaj faru same. Vi povas ankaŭ doni al infanoj kaj legi ĝin por infanoj, sed neniuj estas tro aĝa aŭ saĝa por povi legi ĝin por propra plezuro.

Stellan Engholm

Wörterbuch Deutsch-Esperanto de Hans Wingen, eldonejo de Limburger Vereinsdruckerei, Limburg/Lahn. 177 paĝoj, 12 × 17 cm., prezo GM 7.50.

La germana lingvo estas tre riĉa je radikoj, do kutime en vortaroj kun aliaj lingvoj la germana-xa parto estas pli dika ol la xlingva-germana. Escepton en tiu regulo faras la nova vortaro de Wingen, kiu devas esti la kompletigo de la Esperanto-germana vortaro de Butin kaj Sommer, aperinta la antaŭan jaron ĉe la sama eldonejo en amplekso de 244 paĝoj. Do oni devas supozi, ke la nova libro estas tre malkompleta jam antaŭ ol oni malfermas ĝin. Ekzakta kontrolo verigas tiun supozon kaj efektive ne nur mankas malnoviĝintaj germanaj vortoj sed ankaŭ tiaj, kies mankon la uzanto malagrabla sentas.

Mi supozas ke la kaŭzo de tiu ŝparo estis la deziro igi la libron ne tro multekosta. Post tiu kritiko, kiu temas pri demando, pri kiu eble ne la aŭtoro sed la eldonejo kulpas, ni esploru, kiamaniere li plenumis la taskon doni al ni la maksimumon sur la malampleksa spaco, kiun li povis plenigi. En tiu rilato ni povas esprimi nian grandan kontentecon. La Wingen-vortaro estas tre bona, laŭlingve ĝi staras sur la nivelo de la aktuala evoluo de Esperanto, kaj laŭ la prezentado de la maniero ĝi ege ruze eluzas la lokon eĉ sen utiligi mikroskopan kompostaĵon. La Esperantistaro en la germanlingvaj landoj ŝuldas grandan dankon al la aŭtoro, ke li transprenis la penigan vortaran laboradon por forigi mankon, kiu multe ĝenis ilin en ilia praktika kaj instrua laboro dum la lastaj jaroj.

A. Baur

Marinko Gjivoje : Bibliografija Medjunarodnog Jezika u Jugoslaviji (Bibliografio de Internacia Lingvo en Jugoslavio)—Zagreb, 1954. Eldono de Jugoslavia Esperanto-Federacio, Zagreb, Amruševa 5. Presejo Grafički Zavod. 23 × 17 cm., 40 p. Prezo 120 Din. aŭ 5 respondkuponoj.

La verko ampleksas 229 bibliografiajn unuojn. Ĝi estas dividita en ses partoj: (1) Lernolibroj kaj vortaroj, (2) literaturo originala kaj traduka, (3) aliaj verkoj (sciencaj, gvidlibroj k.t.p.), (4) gazetoj kaj revuoj, (5) provoj krei mondan lingvon en Jugoslavio kaj lernolibroj de malsukcesintaj projektoj, (6) verkoj en brajla skribo. Ĉe la fino estas aldonita indekso de aŭtoroj, tradukantoj kaj redaktoroj, menciitaj en la Bibliografio. Antaŭparolon verkis Marko Demetrović. En la enkonduko la aŭtoro donas koncizan historion de la Esperanto-Movado en Jugoslavio, ek de la unuaj pioniroj en 1904 kaj la unua lernolibro en 1908 ĝis la brila ekfloro en la jaroj senpere antaŭ la milito kaj en la nuntempo. Kelkaj titolpaĝoj de valoraj eldonaĵoj estas reproduktitaj en la belaspekta broŝuro.

La Bibliografio estas rezulto de ampleksaj esploroj kaj pena laboro, faritaj kun profundaj scioj pri la traktata temo, kun scienca objektiveco, arda amo kaj laŭ la plej modernaj principoj. La Bibliografio donas precizajn kaj korektajn informojn pri ĉiuj verkoj rilatantaj al la Internacia Lingvo, aperintaj en Jugoslavio aŭ de jugoslaviaj aŭtoroj en eksterlando. La recenzanto rimarkis nur iujn manketojn en la ero 148 koncerne la redaktadon de la Suda Stelo en la periodo antaŭ la milito kaj en tiu de 1947–1949. Plue, la Akademia Esperantista Klubo, kiu ludis decidan rolon en la Jugoslavia Esperanto-Movado precipe ek de la jaro 1934, estis fondita en 1929 en la Universitato de Zagreb, kaj ne en 1934, kiam ĝi estis tre sukcese reorganizita.

La verko de Marinko Gjivoje estas altvalora kompletigo de la Bibliografio de Stojan kaj signifas konsiderindan kontribuon al la biografiaj studoj de la Centro de Esploro kaj Dokumentado. Ĝi estas vere unika en sia speco kaj imitinda ankaŭ en aliaj landoj. La aŭtoron, jam konatan kiel redaktoron de unu el la plej bonaj Esperantaj revuoj en la mondo kaj organizanton de altnivela informado en sia lando, ĝi metas en la unuan vicon de seriozaj laborantoj sur tiu ĉi kampo.

I.L.

Sennacieca Revuo, 1955. Ĉi tiu jarkajero, la 4-a, de la kultura revuo de S.A.T. prezentas varie interesan enhavon el plumoj de eminenta vico de kunlaborantoj. 60 paĝoj, 18×22.5 cm. Prezo 4 a. ŝil., 200 fr. fr. ktp., ĉe Sennacieca Asocio Tutmonda, 67 avenue Gambetta, PARIS 20.

Wir lernen Esperanto, die Welthilfssprache de Wilhelm kaj Hans Wingen, eldonejo de Limburger Vereinsdruckerei, Limburg/Lahn. 72 paĝoj, 14×20 cm., prezo GM 2.—.

Ĉi tiu lernolibro estas la plej ŝatata en germana lingvo flanke de la instruistoj kaj flanke de la lernantoj, tion pruvas ankaŭ ke ĝi aperis jam en la kvara eldono. La gramatika materialo estas tre lerte prezentita, klare laŭ metoda vidpunkto kaj same laŭ tipografia formo. La ekzercaĵoj germanaj-esperantaj estas tute laŭcelaj, dum la esperantaj tekstoj povus esti iom pli distraj. La lernendaĵo estas dividita en dekdu lecionoj; tio montris sin tre praktika, ĉar kutime la kursoj daŭras tri monatojn. La samaj aŭtoroj cetere eldonis alian tre utilan libron, kiu servas al progresintoj kaj portas la titolon "Post la kurso". *H.B.*

***Haarlem.** William Leonard. Libere tradukita de Mason Stuttard. 48 paĝoj. 17.5×12.5 cm., sur luksa papero. Eld. De Toorts, Heemstede. Prezo 2ŝ. 3p. afrankite.

Admirinda laŭ formato, presado kaj ilustrado, kun alloga kovrilo ĉi tiu libreto estas nepre havindaĵo de ĉiu Esperantisto—ĉu vojaĝema aŭ ne. Ĝi enhavas pli ol 20 belajn fotojn, kiuj montras kaj la ĉiutagajn vidindaĵojn kaj la antikvajn, riĉajn arttrezorojn de Haarlem. La teksto estas klara kaj facile legebla, kaj la libro interese priskribas la atmosferon de la vivo dum la Ora Epoko de la dek-sepa jarcento ĝis la nuntempa.

Por ĉiu, kiu vizitis la kongreson en Haarlem, jen valora sed malmultekosta memoraĵo. *E.E.M.*

Loetschberg/Svislando, 16-paĝa tut-esperanta prospekto, 20×13 , pri la fervoja linio, kiu kondukas ekde Bern al Thun - Spiez - Loetschberg - Brig - Simplon - Italujo. Ĝi estas grava transalpa linio, sur kiu veturas internaciaj trajnoj. En la nuna jaro ĝi estas aparte interesa por ni Esperantistoj, ĉar por multaj okcidentanoj kaj

nordanoj ĝi estas tre konvena kaj samtempe belega ligo, kiu kondukos ilin al la U.K. en Bologna. La prospekto enhavas informan tekston pri la fervojo kaj krome 11 paĝojn multkolorajn, kiuj klarigas la panoramon, kiun vidas la vojaĝanto. Ĝi estas senpage havebla ĉe Informservo de BLS, Genfergasse 11, Bern, Svislando.

***Norda Prismo**: Kultura, socia, literatura revuo dumonata (n-ro 1, marto-aprilo, 1955; 64 paĝoj plus kovrilo; 21×15 cm.) Barnhusgatan 8, Stockholm, Svedujo. Jara-bono: 6 svedaj kronoj, 15 rkp., 8ŝ. 6p.

Post la bedaŭrata malapero de *Literatura Mondo* kaj *Malgranda Revuo*, la esperantistaro restas sen organo pure literatura. Tial ĉi tiu nova gazeto, sub la fidinda redaktado de D-ro Ferenc Szilágyi, estas aparte bonvena. Redakcia artikolo klarigas la titolon de la revuo jene:

Nia vidpunkto estas norda, skandinavia sed ni ne limigos nian horizonton nur al la nordo, tra norda prismo ni esploros aliajn regionojn.

La listo de kontribuintoj al la unua numero estas impona; ĝi inkluzivas Poul Thorsen, Magda Carlsson, St. Urban, Geraldo Mattos, kaj D-ron Szilágyi mem. La ekstera formo estas tre kontentiga. Preso kaj papero estas bonega. Multaj ilustraĵoj alternas kun la diversspecaj prozaĵoj kaj poemoj.

Nenio en la unua numero estas malpli ol interesa. La samideanaro nur memoru, ke (kiel diras D-ro Szilágyi en antaŭparolo) "nia kulturo bezonas ne nur publikecon, sed ankaŭ publikon."

G. C. Jervis

Sur la recenzo pri **Manuel d'Initiation** (p. 205, Junio) mankis jenaj indikoj. Eldonis: Librairie des Editions Nova, 24 Fbg de Riedesheim, Mulhouse (Franc.); prezo kun sendkosto 120 fr. frankoj aŭ 4 rkp.

Lo Gai Saber—*Revista de l' Escola Occitana*. Paĝoj 361 ĝis 370—*André Albault*: *Valère Bernard verkisto kaj artisto oksitana, poeto de Lingvo Internacia (franclingve)*.

En la supre nomita revuo, D-ro Albault konigas al la oksitana* mondo la esperantistan flankon de unu el ĝiaj elstaraj poetoj, Valère Bernard, aŭtoro, i.a., de esperantaj poemoj: “Kanto de la nomadoj” kaj “La feinoj”.

Se la artikolo surprizos la sudfrancajn dialektantojn pri tiu nekonata flanko de ilia poeto, ĝi certe ne malpli surprizos la esperantistojn aŭdi pri ĝis nun tute ignorita poeto, kies verkaro lokiĝas inter 1924 kaj 1928. Ne povante detale analizi la artikolon, tre interesan, mi citu almenaŭ parton el ĝi:

“*Rimarkinda, en ambaŭ ĉi poemoj, rilate la lingvon, estas la senpera kreopovo de la poeto. Pro plena okupiteco en sia pentrist-kaj artist-laborejo, kaj siaj rilatoj kiel oksitana verkisto, li tre certe neatentis la esperantistan mondon, kies literaturajn tendencojn li konis nur tre malmulte. Li do staras izolulo; sed en sia izoleco li tamen kapablis konstrui siajn proprajn stilon kaj esprimojn. Karakterizas lin, koncerne la lingvon, lia izoleco kaj lia krea fantazio: ĉe kelkaj punktoj li antaŭis tre atentindajn aŭtorojn, ĉe aliaj li restis malantaŭe.*”

Kiel D-ro Albault, ni bedaŭras, ke la Esperanta mondo ne povis koniĝi kun tiu verko kaj same esperas, ke montriĝos la ebleco konigi ĝin almenaŭ al la specialistoj.

Roger Bernard

*La “oksitana” grupo de lingvoj entenas ĉiujn sudfrancajn dialektojn (*langue d'oc*), kies plej konato eksterlande estas la provençala.



El la Esperanta originalo. 1. *La Gazeta Comercial (Brazilo)* de 20a de Aprilo reprenis la poemon *Atoma bombo* (el *Revuo Esperanto*) kun paralela portugala traduko. Tradukoj el nia originala poezio akcentas nian kulturon, precipe se ankaŭ la traduko estas memstara poemo.

2. En *La Dépêche du Midi* (Toulouse, **Francujo**) de 10.IV, traduko de la Esperanta rakonto *Luphomoj de Sudameriko* de Erika Linz okupis ĉeflokon sur la 6a paĝo. Du ilustroj kaj noto pri nia revuo (de kie oni ĉerpis la novelon) kaj pri la aŭtorino efike prezentas la verkon.

La langue internationale Esperanto en 30 leçons (La lingvo internacia Esperanto en 30 lecionoj) de André Ribot, eldonoj Albin Michel, Parizo, 230 fr. fr., 80 paĝoj 13 × 18.

Prezentante sian libron sub la ŝildo de granda eldona firmo franca, la aŭtoro celis verŝajne atingi la vastan publikon, ĉar, ĝenerale, niaj lernolibroj estas troveblaj nur en esperantistaj eldonejoj, nekonataj de la “homo en la strato”.

Laŭdinda provo. Bedaŭrinde, la teknika valoro de la libro ne sufiĉe subtenas la intencon. Kvankam la aŭtoro admonas, ke lia metodo devas esti nur unua paŝo sur la vojo al bona kono de la lingvo, necesus tamen elvolvi ĝin en neriproĉinda maniero. Kio ne ĉiam estas la kazo. La prezento kaj klarigo de la gramatikaj reguloj estas ofte ne sufiĉe klara, foje eĉ fantazia kaj erara. Ne mankas pres-eraroj, ofte tre ĝenaj. La aŭtoro estus evitinta ĉiujn ĉi mankojn submetante sian verkon al aŭtoritata “kolego”: ĵurnalistoj prefere verku gazet-artikolojn, kaj la gramatikojn verku gramatikisto!

X.B.



Aperis la tria libro de
STAFETO

belliteratura eldonserio

J. Régulo Pérez, La Laguna de Tenerife

EL LA MANIKO
Reto Rossetti

noveloj kun du detektiv-rakontoj

16 × 22.5 cm. 224 paĝoj

kun dukolora kovrilbildo

Prezo: 12ŝ. plus sendokosto

ĉe U.E.A. kaj la landaj libroservoj



40-a Universala Kongreso de Esperanto

Bologna, Italujo, 31.VII-6.VIII, 1955

N-ro 8

OFICIALA KOMUNIKO

Julio 1955

Limdato : POST 30 JUNIO LKK NE PLU AKCEPTAS ALIĜOJN. Post 30 junio LKK fermas siajn kontojn. NE PLU SENDU MONON. Krome ne plu mendu litojn kaj ekskursojn.

Specialaj kartoj : Kiuj venos al Bolonjo ne antaŭe aliĝinte al la kongreso, povos aĉeti ĉe la Kaso (la Universitato) SPECIALAN KONGRESAN KARTON sen numero. Personoj, kies aliĝo ne atingis LKK antaŭ la fino de junio devos kontentiĝi je tiu rimedo de partopreno en la kongreso. Kun la karto LKK donos ankaŭ Kongresan Libron kaj Insignon.

Kongresa Libro estas sendita al ĉiu aliĝinto meze de junio.

Statistiko : Argentino 1, Aŭstralio 2, Aŭstrio 25, Belgujo 17, Brazilo 3, Britujo 87, Cipro 1, Ĉinujo 1, Danujo 55, Egiptujo 1, Finnulo 50, Francujo 287, Germanujo 124, Hispanujo 8, Indonezio 1, Irlando 3, Italujo 294, Izraelo 2, Japanujo 1, Jugoslavio 94, Kanario 1, Kubo 1, Maroko 24, Nederlando 156, Norvegujo 39, Novzelando 3, Portugalujo 6, Sarlando 2, Sudafriko 1, Svedujo 172, Svislando 33, Turkujo 1, Urugvajo 3, Usono 15, Venezuelo 1. Sumo el 34 landoj 1,494. Interesaj ciferoj : Nemembroj de UEA 28% ; instruistoj 18% ; dommastrinoj 13% ; oficistoj 7% ; studentoj 6% ; gejunuloj sub 20 jaroj 7%.

Nome de L.K.K., Mason Stuttard, K.K.S.

Oni komunikas ke dum la tagoj 27, 28, 29 de julio, la MILANA ESPERANTO-GRUPO, Piazza Oberdan I, Milano, estas malfermata je dispono de la samideanoj kiuj survoje al Bolonjo haltas en Milano kaj bezonas informojn. Estas preferinde antaŭsciigo.

Internacia Konkurso 1955

Stato je la 31a de majo

Lando	Kvoto	Poentoj	%				
1. Izraelo ..	250	320	128.0	14. Svedujo ..	5900	5315	90.1
2. Japanujo ..	900	1095	121.7	15. Hispanujo ..	1600	1440	90.0
3. Finnlando ..	2500	2780	111.2	16. Kanado ..	350	315	90.0
4. Aŭstralio ..	1000	1110	111.0	17. Portugalujo ..	500	445	89.0
5. Germanujo ..	3700	4025	108.8	18. Sudafriko ..	350	305	87.1
6. Maroko ..	750	815	108.7	19. Novzelando ..	800	694	80.7
7. Nederlando ..	4600	4969	108.0	20. Meksikio ..	250	210	80.4
8. Francujo ..	5100	5448	106.8	21. Islando ..	350	280	80.0
9. Urugvajo ..	300	310	103.3	22. Britujo ..	9200	7288	79.2
10. Belgujo ..	2100	1992	94.9	23. Aŭstrujo ..	1200	895	74.6
11. Svislando ..	1600	1505	94.1	24. Sarlando ..	250	170	68.0
12. Usono ..	2300	2120	92.2	25. Danlando ..	2500	1670	66.8
13. Jugoslavujo ..	1750	1600	91.4	26. Norvegujo ..	2200	1425	64.8
				27. Brazilo ..	6400	4115	64.3
				28. Italujo ..	2900	1850	63.8
				29. Kubo ..	250	150	60.0
				30. Irlando ..	250	100	40.0

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Centra Oficejo : Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

OFICIALA INFORMILO

N-ro 273

la 1an de junio, 1955

STATISTIKO. Jen la stato de la membraro je la fino de majo kaj ankaŭ, por komparo, je la fino de majo 1954 :—

	1954	1955
Asociaj membroj ..	6123	3231
Individuaj membroj :		
MJ 880		788
MA 3696		3663
MS 688		753
Patronoj 7		9
DM 271		288
HM 56		57
	— 5598 —	5558
	11721	8789

DELEGITOJ

Aŭstrujo

Innsbruck. FD (Komerco) : vakas.

Belgujo

Ronse. D : vakas.

Brazilo

Piraçununga (São Paulo). D : S-ro Jaime Ferreira de Albuquerque, Av. Prudente de Moraes, 66. Tel : 378.

São Paulo (São Paulo). D : S-ro Horacio Pereira dos Santos, Rua Florêncio de Abreu no. 474. Tel : 35-1146.

Britujo

Anglesey (North Wales). D : vakas.

Nottingham (Nottinghamshire). FD (Juro) : S-ino C. I. Appleby, "Fenimore", 26 Grantham Road, Radcliffe-on-Trent. Tel : Radcliffe-on-Trent 532.

Danlando

Aabyhøj (Jutlando). FD (Elektrotekniko) : vakas.

Francujo

Alès (Gard). D : vakas.

Les Andelys (Eure). D : S-ino Jeannine Le Goff, Avenue du Général de Gaulle.

Nantes (Loire-Maritime). D : S-ro Pierre Chevalier, 19 Boulevard Gabriel, Lauriol, Nantes. Tel : 149.21.

VD : S-ro Luc Béliard, 99 rue du Général Buat. Tel : 111.20.

FD (Farmacio) : La D.

FD (Katolikismo) : S-ro Robert Olivaux, 20 bis rue Noire. Tel : 131-66.

Pontarlier (Doubs). D : S-ro Gaston Turin, 43 rue Emile Magnin.

Rombas (Moselle). D : Pastro Max. H. Kubler, 22 Grand' Rue. Tel : 72.

Roubaix (Nord). FD (Junularo) : S-ro Lucien Giloteaux, 8ter/25 rue de Soubise.

Sain-Bel (Rhône). D : F-ino Jeannine Perra, rue du Moulin.

Valenciennes (Nord). D : S-ro Paul Brunet, 1 rue Henri Lemaire.

Germanujo

Braunschweig (Niedersachsen). D : S-ro Joachim Giessner, Hauptbahnhof 6. Tel : 20101/Aparato 391.

FD (Fervojoj) : La D.

Murnau (Ober-Bayern). D : vakas.

Solingen (22a) (Nordrhein-Westfalen). D : S-ro Artur Gitzinger, Am Kannenhof 49.

Hispanujo

Barcelona. FD (Scienco) : S-ro Salarich Juan Viver, Alfonso XII 55 2°. Tel : 28 74 58.

Izraelo

Tel-Aviv. FD (Lingvoj) : S-ro Itamar Even-Zohar, Rehov Hajarkon 234. Tel : 23648.

Jugoslavujo

Temerin (Vojvodina). FD (Lingva-instruado) : S-ro Imre Nagy, Maršala Tita 203.

Maroko

Rabat. VD : René Cagnon, 9 rue Coli, Rabat. Tel : 236.00.

Nederlando

Eindhoven (Noord Brabant). FD (Tekst-industrio) : S-ro Frans Slegers, Rogier van der Weydenstraat 39.

Hoogezand (Groningen). D : S-ino Froukje Vinckers-Reinek, Jan Huitzingstraat 14. Tel : 2746.

Nieuw-Scheemda (Groningen). D : vakas.

Norvegujo

Oslo. La D forestas dum kelka tempo. VD S-ro Otto Munthe-Kaas Pay, Jac. Aalls gt. 10 IV, Tel : 55 08 97 funkcias kiel D.

Rodezio**Bulawayo** (Matabeleland). D : vakas.**Broken Hill** (Central Province). D : S-ro William Bickley, P.O. Box 51.**Sud-Afriko****Pretoria** (Transvaal). D : S-ro Thomas C. Hawley, P.K. 449, Pretoria. Tel : 28502.**Svedujo****Hammarö** (Värmland). S-ro Albin Fauhlér, Västra Skagene. Tel : Karlstad 26017.**Malmberget** (Norrbotten). VD : vakas.**Malmö** (Skåne). D : S-ro Oscar Runerheim, Falsterbogatan 24b. Tel : 14741.**Skövde** (Västergötland). FD (Ĵurnalismo) : S-ro Börje Andersson, Ingegatan 4A. Tel : 2205.**Usono****Bradford** (Ohio). FD (Filatelo) : S-ro Elwood R. Etter, R.R.1. Tel : 3442-4.**Brooklyn** (N.Y.). FD (Instruado) : S-ro Andrew Rogus, 137 Meserole Ave., Brooklyn 22.**Elwood** (Indiana). D : S-ro Robert Powell, 1233 North Anderson St.

FD (Protestantismo) : La D.

Milwaukee (Wisconsin). FD (Bahaismo) : S-ro Anthony Nabby, 133 West National Ave., Milwaukee 4.**NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ**Ferreira, S-ino N., Cape Town, Sud-Afriko
Jenkins, S-ro H. C., Philadelphia, Usono**MEMBRO-SUBTENANTOJ 1955**

602. Høkansson, S-ro H., Traryd, Svedujo

603. Enstrom, F-ino M. L., Johanneshov, Svedujo

604. Ekbom, F-ino A., Boden, Svedujo

605. Ekman, S-ro A., Norrahammar, Svedujo

606. Carrfors, S-ino S., Bromma, Svedujo

607. Blid, S-ro A., Nynäshamn, Svedujo

608. Brusewitz, S-ro L., Alkkarleby, Svedujo

609. Arton, S-ro A., Vollsjö, Svedujo

610. Asp, S-ro B., Johanneshov, Svedujo

611. Bengtsson, S-ro E., Hälsingborg, Svedujo

612. Andersson, S-ro L., Hoje, Svedujo

613. Almèn, S-ro P., Hällefors, Svedujo

614. Ahlgren, S-ro A., Göteborg, Svedujo

615. Ihrborn, S-ro O. N., Alstad, Svedujo

616. Svensson, S-ro A., Göteborg H, Svedujo

617. Malmkvist, S-ino K., Visby, Svedujo

618. Andersson, S-ro O. B., Lund, Svedujo

619. Björkstrand, S-ro E., Skelleftea, Svedujo

620. v. Dongen-Flapper, S-ino M. F., 's-Hertogenbosch, Nederlando.

621. Langelier, S-ro C., Lochem, Nederlando

622. Gaillard, S-ro A., Paris, Francujo

623. de Oliveira Storace, S-ino M. L., Santos, Brazilo

624. Gomes Guarnieri, S-ro J., Campinas, Brazilo

625. Soares Portugal, D-ro F. J., Curitiba, Brazilo

626. da Costa Filho, S-ro F. F., Rio de Janeiro, Brazilo

627. de Albuquerque Maranhão, D-ro A., Baturité, Brazilo

628. Pereira de Souza, S-ro N., Rio de Janeiro, Brazilo

629. Silva, S-ro L., Baurú, Brazilo

630. Palmério, F-ino M. D., Campo Grande, Brazilo

631. de Oliveira, S-ro J. F., Baturité, Brazilo

632. Oliva, S-ro S., São Paulo, Brazilo

633. Ritter Nunes, D-ro M., Niterói, Brazilo

634. Couto Maciel, S-ro J., Salvador, Brazilo

635. Bondarovsky, S-ro S., Barra Mansa, Brazilo

636. Bondarovsky, S-ro E., Barra Mansa, Brazilo

637. Augusto, S-ro O., Barra Mansa, Brazilo

638. Malheiros F. Silva, S-ro M., Rio de Janeiro, Brazilo

639. Vaz, S-ro A. J., Rio de Janeiro, Brazilo

640. Gorbatoff, S-ino A., Oujda, Maroko

641. Haugen, S-ro E. A., Trondheim, Norvegujo

642. Žunko, S-ro O., Pula, Jugoslavujo

643. Divall, S-ro N. H., New Barnet, Anglujo

644. Schleicher, S-ro I., København, Danlando

645. Lange, S-ro O., København, Danlando

646. Bentsen, S-ro A., Vallekilde, Danlando

647. Linnander, F-ino S., Stockholm, Svedujo

648. Svarstad, S-ro I., Los Angeles, Usono

648. Ferrer Soler, S-ro A., La Laguna, Kanariaj Insuloj

649. Simon, S-ro W., Memphis, Usono

650. Lecoeur, S-ro P. G. C., Rabat, Maroko

651. Ronda, S-ro J., Meknes, Maroko

652. Tronchon, S-ro H., Casablanca, Maroko

653. Tronchon, S-ino Y., Casablanca, Maroko

654. Vieira de Araújo, D-ro A., São João da Madeira, Portugalujo

655. Lamberts, S-ro V., Bruxelles, Belgujo

656. Staes-v.d. Voorde, S-ino F., Bruxelles, Belgujo

657. Geers, F-ino B., Antwerpen, Belgujo

658. Geerinck, S-ro R., St. Niklaas, Belgujo

659. De Mot, S-ro R., Bruxelles, Belgujo

660. Boffejon, S-ro H., Antwerpen, Belgujo

661. Boeren, S-ro M., Antwerpen, Belgujo
 662. Berteloot, S-ro O., Denderleeuw, Belgujo
 663. Bernaerts-Toussaint, S-ino L., Anterpen, Belgujo
 663. Van Hill, S-ro B., Madeira Beach, Usono
 664. Owen, F-ino B. W., London, Anglujo
 665. Bat, S-ro, Meknes, Maroko
 666. Ribeiro de Almeida, S-ro P., Belo Horizonte, Brazilo
 667. Silva, F-ino M., Belo Horizonte, Brazilo
 668. Ramos Neto, D-ro B., Lajes, Brazilo
 669. Sparks, Pastro R., Avon (Conn.), Usono
 670. Sinnick, S-ro S. A., Power (W. Va.), Usono
 671. Rousseau, S-ro H., Rabat, Maroko
 672. Van den Heever, S-ro D. J., Bloemfontein, Sud-Afriko
 673. Martins de Souza, S-ro J., Juazeiro, Brazilo
 674. Oliva, S-ro F., Jundiai, Brazilo
 675. Olivio de Melo, S-ro J., Rio de Janeiro, Brazilo
 676. Zuhlke Juruená, S-ino C. A., Rio de Janeiro, Brazilo
 677. Deckers, S-ro R. E., Catalão, Brazilo
 678. Câmara, S-ro R., Olinda, Brazilo
 679. Burger, S-ro P. R., Lajes, Brazilo
 680. de Albuquerque, S-ro J. F., Pirassununga, Brazilo
 681. Castanheira, S-ro J., Bom Sucesso, Brazilo
 682. Ledon, S-ro G. R., Pelotas, Brazilo
 683. Mendes de Queiroz, S-ro M., Santos, Brazilo
 684. Philippe, S-ro H., Arras, Francujo
 685. Dusaúsoy, S-ro J., Paris, Francujo
 686. Pot. Az, S-ro C., Slikkerveer, Nederlando
 687. van Praag, S-ro Mr. Drs. I., Bentveld, Nederlando
 688. Milkuschütz, S-ro J. K., Buenos Aires, Argentino
 689. Hawley, Majoro T. C., Pretoria, Sud-Afriko
 690. van Drunen, S-ro A., Cape Town, Sud-Afriko
 691. Taccani, D-ro L., Milano, Italujo
 692. Klein, S-ro P. H., Essen, Germanujo
 693. Jung, S-ro H., Horrem, Germanujo
 694. Leipold, S-ro M., Weiden, Germanujo
 695. Lowitzer, S-ro F., Bingen, Germanujo
 696. Schulz, S-ro P., Gelsenkirchen-Buer, Germanujo
 697. Junier, S-ro G., Gray, Francujo
 698. Houriez, S-ro J., Achicourt, Francujo
 699. Estrebou, S-ro J., Meknès, Maroko
 700. Achilli, S-ro P., Mazagan, Maroko
 701. Knox, S-ro W. A., Cloverdale, Usono
 702. Rogus, S-ro A. I., Brooklyn, Usono
 703. Planck, F-ino M. L., Kitzbühel, Aŭstrujo
 704. Gurtner, Pastro L., Freistadt, Aŭstrujo
 705. Legret, S-ro A., Vire, Francujo
 706. Nuidan, S-ro A., Savigny-les-Beaune, Francujo
 707. Sutcliffe, S-ro C. K., Berkeley, Usono
 708. Linnander, F-ino S., Stockholm, Svedujo
 709. Skog, S-ro F., Stockholm, Svedujo
 710. Carrfors, S-ro H., Bromma, Svedujo
 711. Tell, S-ro L., Norrköping, Svedujo
 712. Bonet Casanovas, S-ro B., Barcelona, Hispanujo
 713. Reyes Rodriguez, S-ro P., Santa Cruz de Tenerife, Hispanujo
 714. van Lookeren Campagne, S-ro D-ro G. J., Zwolle, Nederlando
 715. Roblin, S-ino M., Meknès, Maroko
 716. Hug, S-ro R., Casablanca, Maroko
 717. Stojnić, S-ro S., Pula, Jugoslavujo
 718. Schernus, D-ro W., Reinbek bei Hamburg, Germanujo
 719. Werner, S-ro H., Mengkofen, Germanujo
 720. Hering, S-ro A., Nürnberg, Germanujo
 721. Marcinski, S-ro W., São Paulo, Brazilo
 722. Vitale, S-ro M., Salto, Brazilo
 723. da Silva, S-ro A. L., Rio de Janeiro, Brazilo
 724. Custodio Machado, S-ro J., Tupaciguara, Brazilo
 725. Fóscolo, D-ro H., Pompeu, Brazilo
 726. Branco Baena, S-ro O., Rio de Janeiro, Brazilo
 727. de S. Almada, S-ro F., São Paulo, Brazilo
 728. Real, S-ro P., União da Vitória, Brazilo
 729. Peixoto, S-ro O., Niteroi, Brazilo
 730. Bideau, S-ro A., Rabat, Maroko
 731. Médina, S-ro, Port Lyautey, Maroko
 732. Ek, S-ro A., Hässleholm, Svedujo
 733. Larsson, S-ro C., Sala, Svedujo
 734. Söderberg, S-ro K., Upsala, Svedujo
 735. Lane, S-ro E. G., Reading, Anglujo
 736. Ploussu, S-ro A., Grenoble, Francujo
 737. Borges Beleza, F-ino I., Belo Horizonte, Brazilo
 738. Pires, F-ino J., Niteroi, Brazilo
 739. Correa Severo, S-ro J., Bajé, Brazilo
- DONACOJ al la Ĝenerala Kaso :** V. Ekström 3\$. 3p., H. Davies, Britujo £2, R. Barta, Usono £1 14\$. 9p.
- Sinceran dankon al tiuj donacintoj**
 J. C. RAPLEY, *Sekretario.*

ANONCETOJ

Kosto : *du pencoj por ĉiu vorto, aŭ 1 respondkupono por ĉiu duo da vortoj.*

La oficiala aperdate de la revuo estas la 1-a de ĉiu monato. Anoncetoj devas atingi la Centran Oficejon kvin semajnojn antaŭ la aperdato de la celata numero.

Trapasante Francujon vizitu Arvernion. Petu turismajn sciigojn al la grupo "Konkordo", 24 strato Jean Richopin, CLERMONT-FERRAND, Puy-de-Dôme. Nepre anoncu vian viziton.

Letervesperojn aranĝas la grupo Lille-Esperanto. Skribu tuj (ĝis 1.11.1955). Adreso : Lille-Esperanto, 40 rue Capitaine Ferber, LILLE-NORD (Francujo).

Irlando—Familio Uiginn gastigus samideanojn iompage ĉe sia Esperanto-Domo, 34 Landscape Crescent, Churchtown, DUBLIN. Omnibuso 14. Telefonu Dublin 880831 antaŭe. Privata adreso (laŭ la Jarlibro) daŭras.

Dek-unu gestudentoj, komencantoj, aranĝos letervesperon en novembro. Aliandaj studentoj skribu al, Clarkson, Tauranga College, TAURANGA, Nov-Zealando.

Bonvolu helpi licean ekspozicion, sendante esperantaĵojn al : S-ro Cartwright, City of Norwich School, NORWICH, Anglujo. Nepre respondos.

Karusel-Vojaĝo, tutnova sistemo de vojaĝo, speciale po esperantistoj. Petu senpagan prospekton ĉe Hans Bakker, v. Tuyll v. Serooskerkenplein 33, AMSTERDAM Z (Nederlando).

Interŝanĝon de nacilingvaj ilustritaj revuoj francaj kaj anglaj kontraŭ portugalaj deziras : Jaime Augusto da Silva, Av. da Igreja, 41, 3° esq. LISBONO (Portugalujo).

Veraj amulet-rememorigaĵoj de Afriko. Nun estas haveblaj en malgranda kvanto amuletoj, kiuj protektas vin kaj donas al vi bon-sorton, se vi kredas je tio. Unu vera specimeno kaj la forsendado rekte al vi kostas nur 5 ŝil. (brita poŝtmandato) aŭ unu 1 dolar-noto. Aĉetu hodiaŭ, kiam ili ankoraŭ estas aĉeteblaj. E. L. Heilberg, KITWE, Norda Rodezio, Centra Afriko.

Ramon Gosalbes Gasull, Str. Buxeda, 45. SABADELL, Hispanujo, deziras korespondi kun gesamideanoj 25-40-jaraj el Kanado pri ĉiuj temoj.

Hispana junulo interŝanĝas poŝtkartojn kun ĉiuj landoj. José Ma Casacuberta. Comercio 12, MOYA (Barcelona), Hispanio.

Mi deziras interŝanĝi poŝtmarkojn kaj unuataĝajn kovertojn kun la tuta mondo. Ĉiam respondos. Henry Stern, 8904 Woodward, DETROIT 2, Michigan, Usono.

Bonvolu sendi informojn pri Esperanto ĉe seminarioj kaj junaj geinstruistoj (enketo de Grupo de Esperantistaj Edukistoj ; peranto : R. Gerard, prof. Lyc. Turgot, 69, r. de Turbigo, PARIS 3e).

Sveda popollernejo deziras desegnaĵojn kaj pentraĵojn de eksterlandaj lernejoj infanoj, prefere ekstereŭropanoj. Kiel rekompenco estas eble sendi desegnaĵojn de svedaj infanoj (aĝo 7-15). Adreso : Klubo Esperantista, S-ro Lars Westman, Granskagatan, 1C, SKÖVDE, Svedujo.

Intersteno — Elementa skribo havebla senpage. Koresponda skribo : 2 rpk aŭ pm. egalvaloraj al C. DAGLIO, Litta Parodi, ALESSANDRIA (Italujo). En multaj lokoj estas haveblaj Interstenaj eldonaĵoj.

"International Language for Scouts." Ĉar vendado de tiu libro kiel lernolibro preskaŭ ĉesis, oni ne plu ĝin vendos, sed ĝi estos ricevebla senpage kiel propagandilo inter ne-esperantistoj kiuj kapablas legi angle. Oni petu ĝin ĉe S.E.L., Wilbury Crest, LETCHWORTH, (Herts.) Britujo, kun promeso mem legi la kvinpaĝan apendicon (p. 64-69) kaj poste aŭ vendi aŭ doni ĝin al iu kiu promesas same.

La Itala Ministerio pri Edukado informas per sia letero de la 23-a de Majo n-ro 2019/82-1, ke 67 lernantinoj, aĝaj inter 14 kaj 17 jaroj, de la Teknika Komerca Lernejo "Daniele Marignoni", Via Melzi d'Eril 9, Milano, Italio, deziras korespondi kun eksterlandaj knabinoj de kiu ajn lando en la lingvo Esperanto. La preferataj temoj estas : muziko, libroj, sporto, moroj kaj kutimoj, filmo, geografio, aŭ tute simple interŝanĝo de poŝtkartoj. La eksteritalaj geinstruistoj de Esperanto en lernejoj por junulinoj estas petataj kontaktigi siajn lernantinojn kun la italaj koleginoj. Oni skribu al la supre menciita adreso de la lernejo.

FINFINE !

ZAMENHOFA VERKO EN INDA VESTO !

NOVA ELDONO DE

FUNDAMENTA KRESTOMATIO

Bele presita per eleganta litertiparo sur tre bona papero
kaj fortike bindita en tolo kun surprisoj oraj kaj verdaj.

La teksto restas senŝanĝe, sed estas centoj da notoj kaj
klarigoj faritaj de

William Bailey, L.K. kaj W. J. Downes, Akademiano

Prezo 18ŝ. 9p., afranko 1ŝ. 3p.

Eldonita de :

THE ESPERANTO PUBLISHING COMPANY, LIMITED

Mendu ĉe :

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Heronsgate, Rickmansworth (Herts.), Anglujo

aŭ ĉe via enlanda libroservo